

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

En la numero:

71-A UK
EN ĈINIO

•

INTERKOM-
PRENIĜO, PACO,
EVOLUO

•

BRIGADANA
SOMERO'86

•

EL LA HISTORIO
DE BEA

•

HEROA PASINTECO

•

INTERŜANĜO
DE SPERTO

•

ESPERANTO
VOJAĜAS

•

NI RECENZAS



JARO 55 • N-RO 10 • OKTOBRO • 86

MALPROKSIMA ĈINIO KONGRESAS



S-ro Huang Hua, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Ĉina Popola Kongreso kaj prezidanto de la Honora Komitato de la 71-a Universala Kongreso salutas la kongresanojn.

SURVOJE AL ĈINIO

Preskaŭ la duono de bulgarioj partoprenintaj en la 71-a Universala Kongreso de Esperanto aliĝis al la ekskurso organizita de „Balkanturist“ speciale por la kongreso. La itinero proponis emociajn travivaĵojn — per aviadilo ĝis Moskvo, kaj de Moskvo — tra Siberio, Bajkalo, Mongolio ĝis Pekino — per trajno! Laŭ tempodaŭro, distancoj kaj impresoj tiu ĉi estis enorma ekskurso: ĝi daŭris ĉirkaŭ unu monaton, la distanco tien kaj reen estis proksimume 20 000 kilometroj. Kaj pri la impresoj? Vi ja mem povus imagi!... En simila artikolo estas malfacile rakonti pri tio vidita kaj travivita.

La grupo forveturis la 14-an de julio j.k. Malgraŭ ke ni restis nur unu tagnokton en Moskvo, ni havis eblecon konatiĝi kun la sennombraj riĉaĵoj de la Armlara Palaco, kun Kremlo kaj la Ruĝa Placo, havi ĝeneralan impreson pri la ĉarma ĉefurbo de Sovetio. Emociigitaj kaj ravitaj de la brilo de juvelaro, meblaro, de la kaleŝoj de rusaj caroj kaj de ĉio eksponita en ĉi tiu trezorejo de la homa majstreco, ni eniris la trans-siberian trajnon, per kiu ni devis atingi Bajkalon! Ni estis avidaj okulkapti ĉiun peceton de la pejzaĝo, ĝis la siberia horizonto: ĉiam verdaj arbaroj, herbejoj, sennombraj lagoj kaj grandegaj riveroj! La dimensioj estas eksterordinaraj: multnombraj urboj kaj grandegaj uzinoj. La siberiaj riveroj! Irĉiŝ, Ob, Enisej, Angara kiel kolosaj arterioj nutras la fortegan korpon de Siberio. La varma vetero kaj la freŝa naturo memorigis al ni pri la milda bulgara printtempo!

La 300-jara Irkutsk ligas sian historion kun la rusaj revoluci-

loj-dekabrismoj, kiujn en 1825 la rusa caro ekzilis ĉi tien. La nova Irkutsk kun la malnovaj romantikaj kvartaloj el belaj lignaj domoj, preĝejoj kun orumitaj kupoloj, la domo de la dekabrismoj, la 20 sciencaj kaj superaj institutoj kun la Filio de la Siberia Akademio de Sciencoj de Sovetunio, situanta tie, kie rivero Angara elfluas el la neimagebla bela kaj pura lago Bajkalo, estas belega turista objekto! Ĝi estas la plej granda riverakva lago en la mondo kun longeco de 636 km, larĝeco de 25—79 km kaj profundo ĝis 1620 m! De hotelo „Bajkal“, kie ni estis enloĝigitaj, montriĝis belega panoramo al la lago, en kiu respuguliĝis la ĉirkaŭaj arbaroriĉaj montoj. La sennuba nokto lumigita de la plenluno, faris fabelan „oran vojeton“ sur la akvo de Bajkalo, dormanta senmove! La du tagoj apud Bajkalo igis nin revii pri reveno ĉi tien. Post tagnokta veturado ni atingis la ĉefurbon de Mongolio — Ulan Bator. Ĉi tie ni ankaŭ renkontis ĝentilajn kaj ridetantajn homojn. Socialisma Mongolio iras la vojon de tute nova vivo, transsaltinte tutan epokon en sia historia disvolvigo. La urbo havas specifan aspekton. Ni vizitis mirindajn historiajn muzeojn de ĥanoj kaj lamaoj: ni ekskursis ĝis la turista loĝloko Terelj, 60 km for de Ulan Bator, ĝis la senlimaj paŝtejoj, kie oni bredas milionojn da brutoj. Impresis nin la sukcesaj klopodoj de la mongoloj elmontri la historion de sia popolo, siajn morojn, kutimojn kaj kulturon. Ĉi tie ni renkontiĝis kun koruso „Rodna pesen“ el Targoviŝte, kiu estis speciale invilita de LKK por la kultura programo de la kongreso en Pekino. Nia grupo, la koruso kaj dudeko da esperantistoj el FR Germanio, Francio, Anglio, Pollando kaj

Hungario post 30-hora trajnado, la 26-an de julio atingis Pekinon — la urbon de la 71-a Universala Esperanto-Kongreso! Ĝi estis la plej multnombro vizitita Esperanto-kongreso ekster Eŭropo en la tuta historio de UEA. Alvenis preskaŭ 2500 geesperantistoj el 54 landoj de la tuta mondo. Inter ili la bulgarioj nombriĝis 136! Samtempe la kongreso estis la plej granda internacia aranĝo en la historio de Ĉinio! La atento al ĝi flanke de la ŝtatestroj, sociaj organizoj, radio, gazetaro kaj televido estis inde granda.

LA OFICIALA INAŬGURO

de la kongreso okazis la 27-an de julio j. k. Ĉeestis s-ro Huang Hua, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Ĉina Popola Kongreso kaj prezidanto de la Honora Komitato de la 71-a Universala Kongreso; s-ro Chu Tunan, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio kaj prezidanto de la Societo „Amikoj de Esperanto“; s-ro Chen Haosu — vicurbestro de Pekino (filo de la fama revolucia marŝalo Pan Chen); s-ro Chen Yuan, vicprezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo; 102 ĵurnalistoj el 48 informagentejoj, radiostacioj kaj TV-kompanioj el diversaj landoj. Antaŭ la oficiala inaŭguro okazis koktelo por diplomatoj el 20 landoj. S-ro Huang Hua salutis la Kongreson en la nomo de s-ro Peng Zhen, prezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio kaj alta protektanto de UK. Li diris, ke Esperanto estas granda idealo, granda strebo kaj ankaŭ granda praktiko. Ĝia centjara ekzisto kaj disvolvigo plene montras ĝian fortan vivopovon. La parolanto interalie rimarkis: „La ĉina popolo havas longan tradicion en la amo al Esperanto... Sincere dirite, nia kontribuo al Esperanto estas nek tiel granda, nek impona, kiel lando kun vasta teritorio kaj multnombra loĝantaro, kia la nia, devus fari... Nia lando, kompreneble, devas fari pli multe da kontribuoj al la homaro, kaj ankaŭ al la granda idealo de Esperanto“. En sia parolo s-ro Chu Tunan esprimis opinion, ke „la lingva baro estas forta ĝeno kontraŭ la progreso de la homaro. Por forigi tiun ĝenon, necesas internacia lingvo“. Ĉiuj kongresanoj estis forte impresitaj de la esperanta parolo de la vicurbestro de Pekino. Multaj el la ĉeestantaj diplomatoj salutis la kongreson. Akompanate de A. Todorov, la inaŭguron ĉeestis la unua se-

(Sekvas sur paĝo 3)



BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

JARO 55

OKTOBRO

10 • 1986

INTERKOMPRENIĜO, PACO, EVOLUO!..

(Inaŭgura parolado de la 71-a UK de Esperanto)

Prof. Humphrey TONKIN, prezidanto de UEA

Per rezolucio de la 24-a de oktobro 1985, la Generala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj solene deklaris la jaron 1986 Internacia Jaro de la Paco. Ĝi krome atentigis, ke la popoloj devas „vivi kune en paco kaj praktiki toleremon“. Estas konate, ĝi aldonis, ke „edukado, informado, scienco kaj kulturo povas kontrubui al tiu celo“.

Unu monaton pli poste, la Generala Konferenco de UNESKO akceptis rezolucion, kiu rekonis la Jubileon de la Internacia Lingvo Esperanto en 1987. Ĝi petis la Generalan Direktoron de UNESKO sekvi la laboron por Esperanto, ĝi alvokis al utiligo de Esperanto flankde internaciaj organizaĵoj, kaj ĝi rekomendis, ke tutmonde oni enkonduku en la lernejojn studadon pri lingvaj problemoj kaj pri Esperanto.

Sekvante la rekomendojn de Unuiĝintaj Nacioj, kaj konsciante pri la decido de UNESKO, Universala Esperanto-Asocio elektis kiel ĉi-jaran temon de sia kongreso la temon „Interkompreniĝo, Paco, Evoluo.“

Tiu temo tre klare implicas, ke paco estas pli ol manko de milito. Por konstrui la pacon, necesas pozitiva agado — agado, en kiu oni celu krei toleremon inter la homoj, subteni kunlaboron kaj konstrui la instrumentojn kaj instituciojn de la paco.

La kreinto de Esperanto komprenis tion. Zamenhof skribis, en nia konata himno, pri „nova sento“. Ni ofte kantas tiujn vortojn, sed ĉu ni vere komprenas la signifon de tiu nova sento? Zamenhof kreis per Esperanto miraklan internacian lingvon, kiu brile funkcias — kiel ni klare vidas ĉi-tie, kie ĉino kompreniĝas kun germano, brazilano kun japano, kanadano kun iranano. Temas pri kompreniĝo, kiu jam preskaŭ cent jarojn mirigas la utiligantojn de nia facila, fleksebla, esprimiva lingvo.

Sed per la vortoj „nova sento“ Zamenhof celis lingvon ne nur de la lango, sed ankaŭ de la koro; ne nur de la korpo, sed ankaŭ de la animo. La arkitektoj de la tutmonda paco, ĉu esperantistaj,

ĉu neesperantistaj, insistas, ke necesas ŝanĝi la pensmanieron de la homoj por krei veran pacon. Tion ni parolantoj de Esperanto komprenas. Ni jam praktikas tiun „novan senton“ — sento, kiu kapablas forigi la miljarajn murojn inter la popoloj.

Pro tio, en nia kongresa temo, ni aldonas al „paco“ ankaŭ la vorton „interkompreniĝo“. Fakte, ni metis interkompreniĝon en unuan lokon, ĉar ĝi estas antaŭkondiĉo de la vera paco.

Ni kongresas ĉi-jare en la plej granda lando de la mondo: unu kvarono de la monda loĝantaro estas ĉina. Ĉinio baraktas kun grandaj problemoj: problemoj de la kreskanta nombro de loĝantaro, problemoj de tekniko, problemoj de organizado. Kajiom post iom ĝi venkas tiujn problemojn. Ĝi estas vere evoluanta lando. La kongresanoj de la 71-a Universala Kongreso spertas de proksime la problemojn kaj la paradoksojn, la esperojn kaj eltrovojn de tiu ĉi lando en stato de evoluo.

La tria elemento en nia kongresa temo estas ĝuste „evoluo“. Per nia temo ni sugestas, ke, same kiel paco dependas de interkompreniĝo, tiel ankaŭ evoluo dependas de ambaŭ tiuj elementoj. La ĉina estas antikva civilizo: ĝiaj kulturaj radikoj penetras profunden la ĉinan teron kaj ĝiaj kulturaj atingoj mirigas la tutan mondon multajn jarcentojn. Necesas samtempe konservi tiun kulturan tradicion kaj modernigi ĝin. Tio estas ebla nur en pacaĵ cirkonstancoj, nur en spirito de interkompreniĝo.

Kio validas por Ĉinio validas ankaŭ por la tuta mondo: nur en paco, nur en spirito de kompreniĝo, ni povos forigi la militon. Milito estas hodiaŭa realo en multaj landoj. Nur en reciproka respekto ni povos nutri la malsatantojn, klerigi la neklariajn, kuraci tiujn, kiuj malsanas. Nur en interkompreniĝo ni povos krei mondon, en kiu regas nova sento, nova spirito de kunlaboro, toleremo kaj egala disdivido de la riĉaĵoj de nia mirakla planedo.

La Internacia Lingvo Esperanto, karaj gekolegoj, donas eblecon atingi tiun tutmondan interkomprenigon, pri kiu aludas nia kongresa temo. Ĝi estas fundamenta elemento en la paco. Ĝi estas utila ilo en la homa kaj ekonomia evoluo, ĉar ĝi kreas reciprokan respekton inter la popoloj kaj kulturoj kaj ĝi ebligas senperan komunikadon en spirito de egaleco inter la homoj. En Esperanto, neniu kulturo subpremas alian kulturon, neniu homo superas alian: ni laboras sur neŭ-

trala lingva fundamento, komprenante unu la alian.

Interkomprenigo, paco, evoluo! Je la sojlo de la Jubileo de Esperanto, ni salutas la evoluantan novan Ĉinion, ni salutas la arkitektojn de la paco tra la tuta terglobbo, kaj ni salutas la parolantojn de la Internacia Lingvo Esperanto, kiuj faras sian kontribuon al kreo de paca mondo, al kreo de nova sento inter la popoloj.

Pekino, 27-a de julio 1986

DIGNE PLENUMITA TASKO



Dora Bojinova — reprezentantino de la Komunuma Pacdefenda Komitato en Ĥaskovo kaj Georgi Idakiev el la Distrikta Estraro de BEA transdonas la subskribojn al Vasja Cvetkova — sekretario de MEM.

En sia marta plenkunsido ĉi-jare, la Bulgara Esperantista Asocio akceptis la Apelon el Hiroŝima kaj Nagasaki por totala malpermeso kaj elimino de nukleaj armiloj, starigante la taskon al ĉiuj distriktaj estraroj por kolektado de subskriboj responde al la Apelo. La Distrikta Estraro en Ĥaskovo tuj okazigis kunsidon kaj decidis fari proponon al Distrikta Pacdefenda Komitato por kunlaboro.

La 1-an de aprilo k.j. la Buroo de Distrikta Pacdefenda Komitato (DPK) akceptis la proponon de DE de BEA kaj devigis la komunumajn pacdefendajn komitatojn, ke ili helpu la kampanjon por kolektado de subskriboj por la paco. Estis eldonita komuna alvoko de DPK kaj DE de BEA al la civitanoj. La 6-an de aprilo k. j. dum la plenkunsido de DPK estis metitaj la unuaj subskriboj fare de la ĉeestantoj.

La alvoko estis presita en 2000 ekzempleroj kaj la folioj por subskriboj estas en 5000 ekzempleroj. Ambaŭ eldonoj estas bele ornamitaj per la emblemo de la Internacia Jaro de Paco.

La Distrikta Estraro de Sindikatoj tre bone subtenis la kampanjon, aktive ĝin partoprenis la Distrikta Kleriga Fakoj, Distrikta Komitato de Komsomolo k. a. En tiu

nobla afero partoprenis multaj aktivuloj. En la kampanjo distingigis la sindonaj esperantistoj Georgi Idakiev, Penjo Stojanov, Nikola Popov, Sterjo Sterev el Ĥaskovo, Jan-ka Koleva, Stanka Sivrijska el Dimitrograd, Todorka Dobriŝinova el Simeonovgrad kaj aliaj. DE de BEA sendis dankleterojn al ĉiuj personoj, entreprenoj kaj organizoj, kiuj aktive partoprenis la kampanjon.

La subskriba kampanjo por pacofiniĝis per tuturba kunveno, dediĉita al la Internacia Jaro de Paco, kio okazis la 26-an de majo k.j. Gastis al la kunveno Vasja Cvetkova, sekretario de MEM. Si prelegis pri Japanio kaj pri la problemoj de la paco. Estis sendita telegramo al Bulgara Pacdefenda Komitato. Dum la kunveno estis transdonitaj la lastaj 10 mil subskriboj. Entute la subskriboj atingis la ciferon 70 000, kiu montras, ke ĉiu kvara homo en la distrikto de Ĥaskovo volonte donis sian subskribon por la paco.

Nia laboro estis alte taksita de D-ro Imré Péthés, prezidanto de MEM, kaj de Kurita Kimiaki, prezidanto de Japana Pacdefenda Esperantista Asocio. Ili sendis ardajn dankkaj salutleterojn al DE de BEA kaj DPK en Ĥaskovo.

En la japana letero oni legas: „... Ni kredas, ke nia afero nuligi nukleajn armilojn firme antaŭenmarŝas. Ankaŭ en nia lando multaj pacamantaj civitanoj volonte akceptas la proponon de la Ĝenerala Sekretario de KPSU Gorbaĉov pri konkreta plano por nuligi nukleajn armilojn. Nun estas vico de Usona Prezidento Reagan tuj kaj nepre respondi. Ni esperas, ke oni komprenas kiel reale aplikebla nia lingvo estas por defendo de paco...“

Konklude, mi volus aldoni, ke plenuminte tiun gravan, aktualan kaj socisignifan taskon, ni pliaktivigis la esperantan movadon en nia regiono, plifortigis niajn ligojn kun neesperantistaj organizoj kaj plialtigis la rolon kaj prestiĝon de la esperantaj societoj en la distrikto.

Nikola PILEV,
prezidanto de DE de BEA, Ĥaskovo

MALPROKSIMA ĈINIO KONGRESAS

(Daŭrigo de paĝo II)

kretario de la bulgara ambasadejo Stefanov kaj la konsilanto Gaberov. La kuba ambasadoro esprimis „Kredon, ke baldaŭ Kubo povus gastigi similan kongreson“.

LA AFERECA LABORO DE LA KONGRESO

Kiel ordinare, la afereca laboro de la Kongreso konsistis en laboro de la Komitato de UEA kaj la laboro en komisionoj, fakaj kunsidoj kaj renkontiĝoj. Baza devo de la Komitato estis la elekto de novaj komitatanoj kategorio „C“ kaj elekto de nova estraro. Unue oni elektis novan prezidanton inter du kandidatoj. Kun granda plimulto la nova prezidanto por la sekvantaj tri jaroj estis elektita d-ro Humphrey Tonkin el Usono. Post longaj diskutoj kaj sugestoj al la komitatanoj la nova estraro konsistis jene:

Humphrey Tonkin — prezidanto (el Usono)

Yosimi Umeda — vicprezidanto (el Japanio)

Flóra Szabó-Felső — ĝenerala sekretario (el Hungario)

Grégoire Maertens — eksteraj rilatoj (el Belgio)

Jean-Louis Texier — interna agado (el Francio)

Victor Sadler — financoj (el Nederlando)

Barbara Despiney — (el Francio)

Diccon Masterman — (el Britio) kaj

Otto Haszpra (el Hungario)

Antaŭ la nova estraro staras grava tasko organizi la esperantistaron dum la Jubilea Jaro 1987 por digna celebrado en la tuta mondo kaj enpaŝigi ĝin en la duan jarcenton de ĝia disvolvigo.

LA INTERNACIA KONGRESA UNIVERSITATO (IKU)

inaŭguriĝis la 27-an de julio. En ĝi prelegis dek sciencistoj el 8 landoj de Azio, Eŭropo kaj Ameriko. Rektoro de IKU estis la eminenta verkisto kaj komitatano de la Ĉina Federacio de la Literatura kaj Arta Rondo, konsilanto kaj membro de la sekretariato de la Ĉina Verkista Asocio kaj vicprezidanto de la ĉina sekcio de la Internacia Verkista Asocio PEN s-ro Ye Junjian. Lastatempe li ofte prelegis en la universitatoj en Norvegio, Danlando, Britio kaj Usono. Li tre estimas la Bulgaran Esperanto-Movadon kaj esperas, ke baldaŭ la kontaktoj plibonigos, kiel dum la kvindekaj jaroj, kiam „per Esperanto en Ĉinion eniris literaturaj verkoj el Bulgario“. En la universitato prelegis ankaŭ nia samlandano Daniela Deneva — diplo-

mito pri geofiziko kaj scienca kunlaboranto. Ŝia temo estis „Internacia strukturo de la tero laŭ sismologiaj donitaĵoj“. Ĉiam post la prelegoj estis diskutoj en varma kolegeca atmosfero.

La bulgara partopreno en la kongreso estis forte rimarkebla. En la kunsidoj de la medicinistoj (gvidis ilin la vicprezidanto de UMEA prof. d-ro Kiril Popov) oni decidis, ke VI Internacia Medicina E-Konferenco okazu en Krakovo, 1987. Unuanime estis akceptita alvoko de UMEA. La filologoj kunsidis sub la gvido de Violin Oljanov. Li partoprenis ankaŭ la kunsidojn de la Akademio de Esperanto, kies membro li estas. La konferenco de la poŝtistoj estis gvidata de la prezidanto de IPTEA Draguško Petrov. En la MEM-kunsido aktivadis Vasja Cvetkova, d-rino Cveta Stamenova kaj Maria Taŝeva. La bulgaraj UEA-komitatanoj Ivan Culev, Jordan Angelov, Petăr Todorov, Dimităr Papazov, Angel Todorov kontribuis al la laboro de la komisionoj pri planado, Jubilea Jaro, elektoj, informado, kongresoj, ĝenerallaj kunsidoj kaj estrarkunsidoj. Menciindas la propono de la Komisiono pri Kongresoj: en Rotterdamo (Nederlando) — 1988, en Braĵtono (Britio) — 1989 kaj en 1990 — eventuale en Aŭstralio aŭ Kubo. La Komisiono pri Landaj Asocioj emfazis la neceson helpi kaj apogi la movadojn en Rumanio kaj Afriko. La aŭtomobilistoj instigis la eldonadon de aŭtomobilista vortaro en kelkaj lingvoj (jam preskaŭ prilaborita) en Bulgario.

Omaĝe al la forpasinta antaŭ ne-longe bulgara kantisto Veselin Damjanov la organizantoj nomis unu el la plej vizitataj salonoj en la kongresejo solono „Damjanov“. La kantistino Joelle Rabuel Kanado, varbita por la Esperanto-movado de V. Damjanov dum lia turneo en Kanado 1984, pro dankemo al li dediĉis sian unuan gramofondiskon al Esperanto!

Fortan impreson pri la bulgara kantmajstreco la kongresanoj ricevis de la plenumoj de koruso „Rodna pesen“ el urbo Targo-viŝte. Multaj kaj longaj estis la aplaŭdoj por la bulgaraj kantistoj dum la oficialaj inaŭguro kaj fermo de la kongreso kaj dum la Internacia Arta Vespero. Post ilia koncerto oni ofte povis aŭdi admirajn esprimojn pri la bulgara korusa kantado. La saman vesperon, kiu estis la finalo de la Tago de la Paco, estis prezentita por unua fojo la novkomponita kanto de la japanoj Hukuzawa Moro kaj Kondo Yusui „Kanto de la Kosmo“. La ĉina ŝtata eldono aperigis la volumon „Poemaro por paco“, en kiu estas ankaŭ verkoj de niaj samlandanoj Asen

Grigorov kaj Violin Oljanov. Ĉi-materialoj estis disdonitaj al ĉiu kongresano.

RIĈA KULTURA PROGRAMO

Sukcese sin prezentis la ĉina arto per tipaj dancado, kantado kaj baletoj. En la Nacia Vespero la kongresanoj ĝuis faman pekinan operon „Sanĉakou“, kreitan jam en 1790 jaro! Ĝiaj ĉefaj melodioj estas la altvoĉa kaj flukanta „ŝjipi“ kaj la serioza „erhŭang“, akompanataj de tri kaj kvarbordaj instrumentoj, tamtamoj, gongoj kaj cimbaloj. La aktoroj en „Sanĉakou“ lerte, laŭ tipe ĉina maniero, uzas armilojn — longajn kaj mallongajn, movigante tute senbrue sur la scenejo, prezentante tre gajajn spektaklojn. En la programero abundis majstraj akrobataĵoj, kies tradicio devenas jam de la Militantaj Regnoj (770—221 a. d.) La harmonia saltado, sinĵetado, ascendo, turnigado estas bonege plenumataj elementoj, kiuj faras la akrobataĵojn agrablaj kaj allogaj. La naciaj dancoj kaj komponaĵoj formis sian originalan stilon. Ekzemple, en la danco „Pavo“ la dancantoj en pav-forma, tre bela kostumo, kun akompano de tamtamoj kaj gongoj flirtas, imitante pavon, kaj prezentas tre graciajn dancmovojn. Tiurilate indas menci ankaŭ la baletan „Silka Vojo“ kie la brilo de kostumoj, koloroj, movoj kaj mildaj sonoj transigis la spektantojn en la mondon de fabeloj...

La LIBROSERVO de la kongreso estis bone organizita. Oni povis aĉeti ne nur la reklamatajn en la UEA-katalogo librojn, sed plurajn altkvalitajn librojn eldonitajn en Ĉinio (Ni rememoru pri la belaj infanlibretoj en la Sofia Foiro de la Libro — 1986), ankaŭ tipajn ĉinajn artaĵojn kaj memoraĵojn, metiartaĵojn, bildkartojn. Speciale por la kongreso estis eldonita arte ellaborita poŝta koverto, sur kiu la aŭtorino s-ro Ren Yu donadis aŭtografojn. La FOTOSERVO de la kongreso funkciis rapide, precize kaj bonkvalite.

La 28-an de julio s-ro Huang Hua akceptis parton de la kongresanoj en la ĉina parlamenta POPOLA HALO. La Popola Halo estas loko, kie oni okazigas plej gravajn kunvenojn kaj akceptas plej honorajn gastojn de la ŝtato. Inter la invititoj estis ankaŭ kelkaj bulgaroj. La bulgaraj komitatanoj estis invititaj al renkontiĝoj-kokteloj de Omoto, de la Ŝtata Eldonejo kaj de Radio Pekino. P. Todorov salutis la Esperanto-redakcion de la ĉina radio, bondeziris novajn sukcesojn en la nobla laboro por disvastigo de Esperanto kaj donacis gramofondiskojn eldonitajn de BEA. En kadre de la kongresa balo-banke-

do la bulgara delegacio en bona internacia etoso konatigis kun la elstara usona verkisto-fantasto H. Harrison. Ĉi tie indas menciigi pri la fama ĉina kuirarto. La ĉinaj pladoj havas belan aspekton kaj nomojn, kiuj faras ilin pli apetitvecaj. La kuiristoj donas al la materialoj diversajn formojn: kubo, strioj, pecetoj, grajnoj, haketaĵoj. . . Ili ofte kombinas salan, dolĉan, acidan, pikantan dekojn da malsamaj gustoj! La unuaj pladoj estas malvarmaj — preparitaj el viando kaj legomoj. La ĉefaj varmaj pladoj estas minimume kvar: el viando, fiŝo, salikokoj k. a. Krome oni intermetas unu-du dolĉajn pladojn. Poste oni surtabligas pladojn el tuta koko, anaso aŭ fiŝo. Fine estas la supo kaj rizaĵo. Ĉiu invitito ricevas manĝbastonetojn, per kiuj ĉinoj lerte manipulas.

PEKINO — la ĉefurbo de Popola Respubliko Ĉinio estas 9-miliona grandega metropolo. Ĝi estas kaj moderna, kaj antikva — videblas nove konstruitaj multetaĝaj domegoj kaj tuj apud ili — malgrandaj unuetaĝaj dometoj. Grandan intereson prezentas la vizito al Imperiestra Palaco — antikva, grandioza, havanta 9000 ĉambrojn, situanta sur 73 hektaroj. Ties fondinto estas Ming-dinastio. Oni povas vidi historiajn objektojn, portretojn de diversdinastiaj imperiestroj, pentraĵojn, kaligrafiaĵojn el diversaj epokoj, sed ĉiam impresajn: rarajn trezorojn kaj valorajn artaĵojn. En la centro de la urbo estas la Tjan'an-man-placo — fama kun sia ruĝfarbita pordego kovrita per flavaj glazuritaj tegoloj. Tie ĉi estas la Monumento de la Popolaj Herooj, kaj sude de ĝi estas la Maŭzoleo de Prezidanto Maŭ Zedong, muzeo de la Ĉina Revolucio. Nepre vizitindaj estas ankaŭ la Ĉiela Altaro, la Somera Palaco kaj multaj aliaj muzeoj kaj parkoj. Sed, estante en Ĉinio, oni ne povas preterlasi la Grandan Ĉinan Muron, etendiĝantan je 6000 kilometroj, kiuj defendas la landon de norde. Eĉ nun ĝi vekas miron pro siaj enormaj dimensioj — sur ĝi povas marŝi homvico el dek personoj! Majesta estas ĝia panoramo, vidata de malproksime!

La ĉinoj estas modestaj, gentilaj kaj laboremaj. Ili neniam prenas kromnomon, ŝatas kontakti eksterlandanojn, ĉiam estas pure vestitaj. Sur la ŝtatoj svarmas la biciklistoj! En Pekino nur la bicikloj estas kvar milionoj! La kultura revolucio tamen tre grave malhelpis la ĉiuspecan disvolviĝon de la lando. La nuna politiko de registaro „malfermitaj pordoj“ puŝas la ekonomion antaŭen. Homoj jam vizitintaj la landon antaŭ dek jaroj, nun konstatas la grandan prosperon. La registaro provas vigligi la kontaktojn ne nur kun la okcidentaj lan-

doj kaj Japanio, sed ankaŭ kun la socialismaj landoj kaj Sovetunio. En Pekino ni vidis ankaŭ bulgarajn kamionojn „Madara-Liaz“!

Se oni devas ĝeneraligi per kelkaj vortoj la rezultojn de la 71-a Universala Kongreso de Esperanto, oni devus diri, ke ĝi estis sukcesa, malgraŭ iuj malfacilaĵoj en la organizado kaj loĝigado. Tio estis kaŭzita, kiel diris s-ro Chen Yuan, de la sensperteco de LKK, kiu ja unufoje organizas tiel grandan kongreson. Por ni bulgaroj la kongreso estis ne nur Esperanto-evento, sed ĝi donis al ni eblecon konatiĝi kun la laboremaj homoj de tiu granda lando, kun iliaj historiaj atingoj, kun ilia kulturo! Dum la oficiala fermo la vicprezidanto de Bulgara Esperantista Asocio ing. Petăr Todorov de la tribuno de la 71-a UK dankis al la ĉinaj organizantoj kaj gastigantoj, bondeziris al ili en la nomo de la paco kaj internacia amikeco novajn sukcesojn, donacis al la Ĉina Esperanto-Ligo buston de D-ro L. L. Zamenhof.

Nun nin atendas obstina, inspirita laboro por digne renkonti la jubilean jaron 1987!

¹Ŝjipi kaj ²erhüang — tipaj ĉinaj kantmanieroj.

P. ANGELOV

*Pekino—Sofio,
Julio—aŭgusto 1986*

17-A GENERALA KUNVENO DE IPTEA

Enkadre de la 71-a Universala Kongreso de Esperanto en Pekino okazis la 17-a ĝenerala kunveno de la Internacia Poŝtista kaj Telekomunikista Esperanto-Asocio (IPTEA).

La ĉeestantoj aŭskultis raporton pri la kontribuo de IPTEA kaj ĝia estraro al preparoj por la 100-jara jubileo de Esperanto en 1987: en pluraj landoj oni eldonos specialajn seriojn kaj apartajn poŝtmarkojn, kovertojn kaj stampojn okaze de la centjara jubileo.

La partoprenantoj diskutis pri starigo de pli intimaj kontaktoj de IPTEA kun kolegoj el la Malproksima Oriento kaj precipe el Ĉinio. Krom la IPTEA-anoj el kelkaj eŭropaj landoj, en la kunveno partoprenis unufoje reprezentantoj de Ĉinio, kolegoj el Hongkongo, Usono, k. a.

Draguŝko PETROV

FESTAKCEPTO DE RADIO PEKINO

La 29-an de julio 1986 pli ol 220 elstaraj esperantistoj kaj aŭskultantoj de la Esperantaj elsen-

doj de Radio Pekino estis invititaj partopreni la festan bankedon en unu el la salonoj de la Radio. La invititoj aŭskultis salutparolon kaj la salutvortojn de multaj esperantistoj el diversaj landoj. Interalie salutparolis en la nomo de la irana grupo fraŭlino Shirin Ahmad-Nia, kiu deklamis sian porpacan poemon, kaj en la nomo de la bulgara grupo salutparolis Petăr Todorov, vicprezidanto de Bulgara Esperantista Asocio. Intertempe kelkaj radio-raportistoj prenis intervjuojn de diversaj ĉeestantoj, kaj reprezentantoj de la Televido senĉese filmadis la arangon.

Poste la buso veturigis ĉiujn ĉeestantojn en la faman restoracion Tian Tan, kie la invititoj havis la eksterordinaran plezuron sur dekdu tabloj gustumi kaj ĝui la fame konatan ĉinan kuirarton, kiu estis prezentita per „sennombraj“ diversaj pladoj, inter kiuj ne mankis rostita viando de . . . sepiol! Ĉio estis treege bongusta kaj multaj jam lerte utiligis la apudmetitajn du manĝbastonetojn . . .


FILOLOGOJ KUNVENIS

La 31-an de julio 1986 je la 8.30 h. en salono Venlo Fon okazis kunveno de la Internacia Unuiĝo de Esperantistoj-Filologoj (IUEF). La kunvenon partoprenis pli ol 50 geesperantistoj-filologoj, inter kiuj multaj ĉinoj. La prezidanto de la Unuiĝo, akademiano Violin Oljanov, malfermis kaj gvidis la kunvenon. Per kelkaj vortoj li skizis la agadon de IUEF kaj parolis pri la ebleco membrigi al la Unuiĝo kaj lige kun tio pri helpo al nepagipovaj filologoj el la Tria Mondo.

Ce la gvida tablo sidis ankaŭ la ceteraj membroj de la Gvida Komitato: d-ro Detlev Blanke (vicprezidanto, GDR), Marin Băcev (sekretario-kasisto, Bulgario) kaj Robert Moorbeek (kasisto, Nederlando).

Post la organizaj demandoj, kiujn tuŝis la prezidanto V. Oljanov, d-ro Detlev Blanke prelegis pri la temo „Kiel nomi Esperanton?“ Post la prelego okazis viglaj diskutoj pri la temo. Prof. d-ro Julius Balbin (Nov-Jorko, Usono) atentigis la ĉeestantojn, ke la ĉina lingvo ne havas la nomon Esperanto. Zhou Huan-Chang (Pekino) klarigis plue, ke en la jaro 1905/1906 la ĉinoj uzis latine literumatan nomon de Esperanto, sed pli poste oni akceptis de la japanoj la nomon ŝri-deĝi signifanta simple „monda lingvo“. . . Sian opinion rilate la nomojn uzatajn kiel sinonimojn de Esperanto esprimis inter aliaj J. R. Perez (Kanarioj), Brian Moon (Luksemburgio), Lin Mo (Ĉinio), Chaterine Schulze (Usono), Zsuzsa Barscsy (Hungario) kaj aliaj.

M. B.



Historia optimismo de bulgara Esperanto-movado (1936–1944)

Ekzistas abundo da faktoj pri generale demokrateca spirito en la medio de bulgara Esperanto-movado ekde ties komencigo (1887). Tamen tre klare kaj elstare aperis tiu tendenco al demokrateco en la lastaj preskaŭ dek jaroj de kapitalisma Bulgario (1936–1944). Pri tio influis kaj la hereditaj cirkonstancoj, sperto, edifo el la interna disvolvigo kaj la imitinda ekzemplo de aliaj organizoj kaj movadoj, kiuj rekte celis rekonstruon de la socia kaj ŝtata vivo por liberigo kaj bono de la laborista klaso kaj de la vastaj popol-tavoloj.

La barbareca rilato de faŝismo en Germanio kontraŭ la monda kulturo generale kaj la ekstrema negativa traktado kontraŭ internaciingva movado konkrete kontribuis, por okupo de sindefenda kaj kontraŭŝtara pozicio fare de la esperantistaro. Aflanke, la esperantistaro kore simpatiis al la tendenco pri unueca fronto por la kontraŭfaŝismaj kaj kontraŭmilitaj fortoj de la homaro. Tiel la esperantistaro trovis sian naturan lokon inter la fortoj konstruantaj la embrion de la kontraŭfaŝisma koalicio en monda skalo. Kion oni faris en Bulgario, en la lando kun plej multnombra esperantistaro?

Socie reakciemaj fortoj en neŭtrala Bulgara Esperantista Asocio (BEA), en kiu landa organizo membris ankaŭ la bulgaraj laboristaj esperantistoj, sukcesis — ne sen helpo de polico — eksigi (en 1927) la komuniston Panajot At. Kolev (1892–1953), fondinton kaj gvidanton de bulgaraj laboristaj esperantistoj, el posteno „Sekretario de BEA“ kaj entreprenis kalumnian kampanjon kontraŭ la bulgaraj laboristaj esperantistoj, konsistigantaj pli ol 80 procentojn el la organizita esperantistaro en BEA. Tiamaniere la bulgara neŭtrala Esperanto-movado vundis sin mem, kaj la BEA-membraro sinkis de 22 000 (en 1927) al nur 400 (en 1928) kaj atingis la minimumon de 187 membroj (en 1933).

Ĉe tiaj cirkonstancoj la laboristaj esperantistoj estis devigitaj starigi propran monatan organon „Balkana Laboristo“ (1929) kaj propran landan organon Bulgara Laborista Esperanto-Asocio (BuLEA) en 1930. En kvar-jara periodo de sia ekzisto (1930–1934) BuLEA-membraro

kreskis de 300 al pli ol 500. Evidente la organizita esperantistaro preferis membri en BuLEA. Tamen la pli granda parto de organizemaj esperantistoj — 1 500 — restis ekster la organizoj (BEA kaj BuLEA), ĉar ili malŝatis BEA kaj timis persekutojn fare de faŝistoj, sed aĉetis (kaj abonis ĉe lokaj perantoj de BuLEA) la laboristan Esperanto-gazetaron.

Post malpermeso kontraŭ BuLEA (1934) fare de la faŝisma reĝimo nur komence iom kreskis la BEA-membraro (de 248 en 1934 al 277 en 1935), sed pro premo ankaŭ kontraŭ BEA neŭtrala Esperanto-movado BEA plue malkreskis al 244 (en 1936) kaj al 235 (en 1937).

La decidoj de la VII Kongreso de Kominternio (1935) estis detalstuditaj kaj diskutitaj en Pleno de CK de Bulgara Laborista Partio (BLP), februare 1936. Estis favore adoptita la agado por starigi unuecan kaj popolan fronton inter la kontraŭfaŝismaj fortoj en Bulgario. Tre baldaŭ BLP sukcesis realigadi unuecan agadon kun tavoloj de socialdemokrata, agrara, radikala, demokrata k. a. burgaj, sed kontraŭfaŝismaj partioj.

Tio tre favoris pri rapida kaj grandskala unuecigo de la bulgara esperantistaro en ununuran, sed demokratiigitan organon — BEA, kaj la bonaj rezultoj por Esperanto ne malfruigis. En 1936 la kunlaboro efektiviĝis en direktoj: a) „Bulgara Esperantisto“ estis afable akceptita kiel komuna organo kaj ĝia abonantaro rapide ekkreskis de 535 (en 1936) al 669 (en 1937), al 11 280 (en 1938) kaj al 13 350 (en 1939). b) En la sama jaro 1936 estis organizitaj komunaj pacmitingoj de esperantistoj en Sofio (en marto) kaj en Varno (en aŭgusto). La idealo de D-ro L. L. Zamenhof, ke la esperantistoj estu „pacaj batalantoj“, sed ne inertaj observantoj komencis vere efektiviĝi.

Impete kreskis la membraro de komuna BEA: de 235 (en 1937) al 482 (en 1938) kaj por la jaro 1939 estis planitaj 675 membroj, tamen fakte efektiviĝis nur 342 kaj en la jaro 1940 — 308 membroj. Tiu subita malkresko okazis pro altruditaj eksigoj el BEA fare

de polico kontraŭ la laboristaj esperantistoj en majo 1939.

Organiza kaj kulturriĉa vivo de la lokaj Esperanto-societoj multon gajnis el la laborist-esperantista sperto pri organizado de kulturkleriga agado. Oni enkondukis novajn metodojn de agado: planado de la entreprenoj, eldonado de „Mur-Gazeto“ en Esperanto, praktikado de „Jurnalo Parolata“ ne nur en la oficialaj kunvenoj, sed ankaŭ dum ekskursoj, grupaj vizitoj; praktikado de kunlaboro kun samnivelaj organizoj: pacifismaj, kontraŭmilitaj, abstinenculaj, kulturklerigaj, junularaj kooperativaj grupoj k. a. Vigligis individua korespondado kaj oni enkondukis sisteman kolektivan korespondadon kun eksterlando. Kolektiva metodo de agado estis vaste aplikata tra la tuta lando. Kolektive laboris ne nur la estraro — centra kaj loka — sed ankaŭ la gvidantoj de fakoj en la estraroj, ĉirkaŭ kiuj formiĝis konsultaj komisionoj de spertuloj. La aktivuloj el laboristaj esperantistoj partoprenis modele je ĉiu nivelo de agado per siaj nelacigeblaj iniciatoj, abunda sperto kaj sindonemo por la bono de la Esperanto-movado (vastigo de Esperanto inter la malriĉaj tavoloj de la popolo, ĵurnalismo, belliteraturo, forta kaj sana organizo kun klara perspektivo pri progresado), profunde konsciente, ke tio estas devo de ĉiu esperantisto, de ĉiu internaciisto al siaj lando kaj popolo kaj al la tuta progresema homaro.

Estis enkondukitaj regulaj Esperanto-elsendoj per Radio „Sofio“ kaj sporadaj elsendoj per Radio „Varno“ kaj iufoje eĉ per Radio „Stara Zagora“. En januaro 1937 oni kunvokis Landan Konferencon (laŭ decido de la Esperanto-Kongreso en Veliko Tŕrnovo, 1936) por pridiskuti en kolektivo de fakuloj la rolon de esperantista presorgano. La Konferenco decidis pri nomo de rubrikoj en „Bulgara Esperantisto“ kaj elektis po unu aŭ du respondeculojn por ĉiu fako en la redakta komitato. Krome, la Konferenco atentigis pri la gravega rolo de centra bulgarlingva gazetararo. Konforme al tiu sugestoj en la somero de 1937 la Redakcio de ĵurnalo „Zarja“ (kun pro-

gresema tendenco) konsentis disponi ĝin semajne „Esperanto-paĝon“. Ĝin redaktis la iniciatinto Asen Grigorov, sed ankaŭ Angel Petkov — Angelo, Boris Golemanov kaj Ivan Keremidĉiev-Esperov.

Por informi la populamasojn pri Esperanto oni eldonis bulgaringve tri unuopajn ĵurnalformatajn gazetojn kaj kvin librojn. Esperantista Societo de Sofio eldonis (laŭ iniciato de Angel Petkov — Angelo) unuopan numeron de gazeto „Fenestro al la Mondo“, oficiale kaj teknike ĝin redaktis Boris Golemanov, fundamente kaj polure perfektigis la tekstojn Asen Grigorov—Ljubin (1936). En 1940 la Esperantista Societo „Albatroso“ en Varno eldonis numeron de gazeto „Esperanto“ kaj en 1942 la redaktora triopo Ivan Keremidĉiev, Konstanteno Bojukiĉiev kaj Violin Oljanov eldonis similan gazeton en Sofio sub titolo „Nov-Jara Folio 'Esperanto'“. Kaj se pri la eldono de unuopaj numeroj de propagand-gazetoj la iniciativo apartenis al la laboristaj esperantistoj membrantaj en BEA, do pri eldono de la kvin libroj kune kun la laboristaj esperantistoj (Nano Nanov, Vasil Coĉov, Ivan Keremidĉiev, Ivan Iliev kaj la verkisto Georgi Karaslavov) partoprenis ankaŭ neŭtralaj esperantistoj (Panajot Ĥitrov, Simeon Ĥesapĉiev kaj Ivan Krestanov).

Panajot Ĥitrov (1891—1945) aperigis sian aŭtobiografion kun rememoroj pri la Esperanto-movado sub titolo „Esperanto kaj unu vivo esperantista“ (1939). Al bulgaro leganta tiun verkon ofte ŝajnas, ke Panajot Ĥitrov estas por la bulgara esperantista movado tio, kio estas la monaĥo Paisio Ĥilendaro (1722—1773) por la bulgara popolo per sia fama verko „Historio de la Slav-Bulgaroj“ (1762). La verko de P. Ĥitrov jam preskaŭ duonjarcenton ne ĉesas altiri legantojn, inciti historiistojn, mirigi estetikulojn. La proverbeca stilo impresas la leganton kaj tiu longe memoras karakterizon pri lokoj kaj eventoj, pri funkcioj kaj faktoj. La verko havas dekelkajn erarojn, malgustojn kaj mankojn, kiuj ofte estas „argumentoj“ por starigo de falsaj tezoj kaj tro pretendemaj asertoj. Estus bone, se BEA eldonos tiun verkon kun aldono de ampleksa antaŭparolo kaj kun klarigaj notoj, kiuj korektos kaj kompletigos tiun legendan kaj legendan verkon. Tri librojn eldonis Simeon Ĥesapĉiev en „Biblioteko 'Verda Stelo'“, n-ro 1: „D-ro L. L. Zamenhof: letero pri Deveno de Esperanto, Sevliev, 1939“, kun paralela teksto en Esperanto kaj bulgara lingvo kaj kun multaj klarigaj notoj, kaj n-ro 2 „Fenestro al la Mondo, Sevliev, 1940“, kolekto de leteroj el eksterlando,

tradukitaj en bulgaran lingvon. Am baŭ tradukojn faris S. Ĥesapĉiev. La n-ro 3 de la biblioteko estas „Simeon Ĥesapĉiev: El la Historio de Esperanto, Sevliev, 1941“. Ĝi estas lingvistika studo de Ĥesapĉiev pri malnova redakcio de Esperanto.

Ivan Keremidĉiev kompilis kaj eldonis „Popola Kalendaro 'Esperanto', 1941, Sofio“, kiu fakte estas kolekto de artikoloj pri D-ro L. L. Zamenhof, pri Esperanto, pri metodoj de agado kaj propagando, pri interŝanĝo de sperto, poemeto de ĉina esperantisto tradukita en bulgara lingvo. Nano Nanov kaj Vasil Coĉev tradukis el Esperanto la biografion de D-ro L. L. Zamenhof, de soveta esperantisto E. Drezen (verkita en 1929), eldonita de la tradukistoj en bulgara lingvo, Sofio, 1941. Ivan Iliev eldonis „Sub la ombro de la piramidoj. Vojaĝnotoj el Proksima Oriento, kun kaj Egipto“, kun antaŭparolo de la verkisto Georgi Karaslavov, redaktis Ivan Esperov. Bedaŭrinde restis ne eldonita la kelkajn fojojn reklamita libro „Tra Eŭropo per Esperanto“, de fama bulgara propagandisto kaj vojaĝanto Ivan Ĥaralampiev Krestanov (1890—1966).

Canko MURGIN
(Daŭrigota)

Internaciaj someraj kursoj

Ankaŭ ĉi-jare la Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica pruvis, ke ĝi estas unu el la bonaj lokoj por praktika uzo de Esperanto. Jam kvinan jaron ĝi kontribuas al la sukcesa instruado de Esperanto. IEK ankaŭ estas utila feriejo por renkontiĝoj de esperantistoj el diversaj landoj, kie oni aranĝas kulturajn programojn, ekskursojn, gajajn vesperojn. Ne malpli gravan rolon ludas la trafe elektitaj lektoroj kun bona lingvokono kaj interesaj instrumentodoj.

La ĉi-jarajn internaciajn somerajn kursojn, kiuj okazis de la 1-a ĝis la 20-a de julio kaj de la 1-a ĝis la 20-a de aŭgusto, partoprenis pli ol 240 gekursanoj el ok landoj — Bulgario, Francio, GDR, Greklando, Jugoslavio, Hungario, Sovetunio kaj Vjetnamio. Jam en la komenco ekgregis intensa, sed agrabla instrulaboro. Kursgvidantoj en julio estis: Penka Bujukiĉeva — unua grado, Eva Bojaĝieva kaj Karola Lezh (GDR) — dua grado, Nikolaj Bojaĝiev — tria grado, Libertaria Mladenova — metodika kurso; kaj en aŭgusto: Rumjana Janeva — unua grado, Kremena Baceva kaj Aleksandr Ŝjafer (USSR) — dua grado, Libertaria Mladenova kaj Nedka Valjaviĉarska — tria grado, Nikola Uzunov — metodika kurso. La invito de alilandaj lektoroj estas, laŭ mi, reciproke utila. En Bulgario ekzistas trigrada instrusistemo de Esperanto kaj al niaj alilandaj kolegoj estis interese ekkoni ĝin. Aliflanke, la interŝanĝo de sperto rilate diversajn instrumentodojn certgrade kontribuis al variigo kaj plibonigo de la instruproceso en Pisanica. En la komenca kurso en julio oni lernis laŭ la „Lernolibro de Esperanto“ de Iv. Sarafov, K. Markov kaj K. Vălev, kaj en aŭgusto — laŭ la „Ekzerco“ de N. Janev. Uzante du diversajn lernolibrojn, la lektoroj serĉis diversajn vojojn por konigi al la kursanoj la gramatikan kaj la leksikan partojn de unua grado. En la daŭriga kurso ĉiuj lektoroj uzis

la lernolibron „Ni lernu plu“ de V. Oljanov. Pere de preskaŭ malsamaj metodoj (Kr. Baceva kaj Al. Ŝjafer) la lektoroj plensukcese atingis sian celon. Jam en la komenco de la kurso ili sukcesis kapti la atenton de la kursanoj, la paroligo efektiviĝis per diversaj ludoj, kantado, la seka instruado de diversaj gramatikeroj entute mankis, kaj ĉio ĉi — laŭ originala maniero. En la supera kurso oni lernis laŭ la lernolibro „Al perfektigo“ de V. Oljanov. Estas sciate, ke la sintaksa parto de la E-gramatiko estas sufiĉe komplika kaj ne hazarde ĝi estas instruata en la supera kurso. Sed estus duba la sukceso fine de la kurso, se la lektoroj ne serĉis konstante formojn kaj manierojn por variigo de la lecionoj. Pere de diversaj didaktikaj lingvaj ludoj la kursanoj sin ekzercis uzi malsimplajn frazojn. La interparolo en la lecionoj efektiviĝis per donitaj sociaj temoj, kiuj tre bone montris la lingvan nivelon de la kursanoj, ties perfektigon dum la kurso. Apartan intereson vekis la temoj pri la Internacia Lingvo — la lingva problemoj en UNESKO kaj Unuigintaj Nacioj, lingva diskriminacio, la lingva problemoj en diversaj sferoj de la socia vivo, kiel popularigi Esperanton k. a.

La eksterkursan tempon oni utiligis por memlernado, kulturaj amuzoj, komunaj vesperarangoj, agrablaj promenadoj kaj dancoj. En aŭgusto estis prezentita monospertaklo de la rusa klasikulo Dostoevskij, plenumis ĝin la leningrada aktoro Oleg Popov. Profesia kantgrupo „Orbita“ ĉe la Sofia E-kluturdomo donis koncerton kune kun soveta kantgrupo el Ukrainio. Talentuloj el ĉiuj grupoj prezentis sin en la arta vespero; la fajro sub libera ĉielo aparte pliriĉigis la restadon en Pisanica.

Pli ol 190 kursanoj faris sukcese ekzamenon por la koncerna grado. Al la diplomitoj — bonŝancon!

Nedka VALJAVIĈARSKA

AMIKO DE JUNAJ ESPERANTISTOJ

Post la Unua Mondmilito, kiam la aŭroro de la Granda Oktobro lumigas ankaŭ la vojon de la bulgara laborista junularo, la batalvicojn de la komunista junulara societo „Spartak“ en Sumen eniras modesta, saga kaj honesta junulo. Tio estas la ĉarpentisto Ljuben Kaŝĉiev.

Li naskiĝis antaŭ 80 jaroj en laborista familio en Sumen. La Komsomolo (Komunista Junulara Unuiĝo) kaj la Partio montras al li la veran vivovoĵon de batalo por socia justeco. Jam junulo, Ljuben Kaŝĉiev konatiĝas kun la Internacia Lingvo Esperanto kaj diligente eklernis ĝin. En sia naskiĝurbo li estiĝas membro de societo „Vekiĝo“ en la maltrankvila jaro 1923. Malgraŭ la kruele teroro post frakaso de la kontraŭfaŝisma ribelo eksplodinta en septembro la saman jaron, la juna komunisto ne deflankiĝas de la justa batalo, sed ekstaras en la frontajn vicojn de la konspira junulara agado. Li kontaktas la partian gvidantinon kaj esperantistinon Vela Piskova kaj laŭ ŝiaj konsiloj laboras por la fondo de konspira junulara organizo. Kiel esperantisto L. Kaŝĉiev perfekte uzas la Internacian Lingvon en la batalo por proleta internaciismo. Dum la sangaj faŝistaj pogromoj en 1925, kiam malaperas por ĉiam multaj bulgaraj komunistoj, li estas unu el la tradukintoj de la defendparolo de P. Piskov — edzo de Vela Piskova, antaŭ la faŝista tribunalo. Tiu parolo estas dissendita en la tutan mondon kaj publikigita en la proleta E-gazetaro. Multajn jarojn L. Kaŝĉiev estas membro de la konspira Distrikta Komitato de la Bulgara Komunista Junulara Unuiĝo, aktive partoprenas la fondiĝon de Sindikatoj. Pro lia aktivado li estas ofte arestata kaj ba-

tata en la policejo, sed lia spirito rezistas al la turmentoj. Esperanto estas lia ŝatata lingvo, per kiu li kontaktiĝas kun progresemaj gejunuloj el diversaj landoj. La leteroj el eksterlando donas al li grandan ĝojon. Krom esperantisto, li estas unu el la unuaj radioamatoroj en Sumen. La radioteknikon li taksas kiel rimedon por realigo de kontaktoj inter la dronanta en politika mallumo patrolando kaj la mondo de libero. Per la aŭdioj de la ellaborita de li mem radioaparato li havas la feliĉon aŭskulti la elsendojn de radio Moskvo jam en la tridekaj jaroj. L. Kaŝĉiev ŝanĝas sian profesion — el ĉarpentisto li fariĝas radioteknikisto, sed la ŝatata profesio ne donas al li ĝojon, ĉar en la jaroj antaŭ la 9-a de Septembro 1944 li estas ĵetita en koncentrejojn.

Post la venko de la socialisma revolucio en nia lando li fordonas siajn fortojn al la batalo por plifirmigo de la popola regpotenco en Sumen. Kiel regula membro kaj aktivulo de societo „Vekiĝo“ li ĉiam trovas tempon ankaŭ por la ŝatata lingvo Esperanto. Lia edzino Mara Kaŝĉieva — batalantino kontraŭ la faŝismo, kaj en la jaroj de socialismo — aktiva sociagantino en Sumen, ankaŭ kontribuas al la disvolviĝo de la E-agado en la urbo kaj la distrikto. Pro multjara agado kiel esperantisto kaj lige kun la 60-jaria jubileo de „Vekiĝo“ en 1965, L. Kaŝĉiev estas distingita de la Ŝtata Soveto de PR Bulgario per ordeno „Kiril i Metodi“ — II grado.

L. Kaŝĉiev forlasis niajn vicojn en 1970. En la memoro de la pli junaj E-generacioj li restos por ĉiam ilia kara amiko.

Cvjatko TODOROV,
prezidanto de societo „Vekiĝo“ — Sumen

Niaj veteranoj

PER PENIKO KAJ PLUMO

Ivan Ŝivarov estas konata ne nur al la plovdiva esperantistaro. Lia agado estas multflanka: fervora esperantisto, pacbatalanto, ĵurnalisto, verkisto, pentristo. Antaŭ nelonge CE de BEA eldonis malgrandan libron sub titolo „Mia trezorejo“ — kolekto de eseoj de Iv. Ŝivarov. Lige kun tiu ĝojiga fakto kaj la 85-jariĝo de la aŭtoro, E-societo „Kulturo“ en Plovdiv organizis vesperon dediĉitan al Iv. Ŝivarov. La solenaĵo okazis la 6-an de junio en la Klubo de Kulturagantoj, kiu estis plenplena de esperantistoj, amikoj de la jubileo, gastoj. Pri la personeco de Iv. Ŝivarov prelegis la prezidantino de la societo Veselina Kurteva.

Naskita en Karlovo en 1901, post malĝoja infaneco, Ivan Ŝivarov iras sian ne tre facilan vojon. La Septembra Kontraŭfaŝisma Ribelo en 1923 estas kruele

sufokita. Senlabora, Ŝivarov frapas de pordo al pordo, sed ĉiam ricevas la saman respondon: „Ne estas laboro“. Li vagas tra la urbo. Hazarde la junulo konatiĝas kun la juna ŝtonhakisto kaj nova esperantisto Nikola Totev, kiu atentigas lin pri Esperanto. Ivan Ŝivarov estiĝas kursano ĉe la elstara plovdiva esperantisto Dim. Malĉev, finas la kurson, poste longe kaj obstine memperfektiĝas en la Internacia Lingvo.

Dum la E-kongreso en Stara Zagora li ricevas diplomon kaj instrurajton, poste multajn jarojn estas senpaga kursgvidanto. Li agis kiel sekretario de „Kulturo“, dum kelka tempo estis membro de la Buroo de MEM, dek jarojn sekretario de la Distrikta Pacdefenda Komitato. Iv. Ŝivarov sukcesis konvinki la komitatanojn, ke oni povas uzi Esperanton en internaciaj rilatoj. De esperantistoj-pacbatalantoj el diversaj landoj la Komitato ricevas 380 diversspecajn semojn de floroj kaj arbustoj, kiujn, oni plantas en la „Parko de Paco kaj Amikeco“ en Hisar. Iv. Ŝivarov sendas al la hungara urbo Debrecen 8 specojn de bulgaraj rozoj por esti plantitaj en la Bulgara Aleo de

la tiea „Parko de Amikeco kaj Paco“. Por lia vasta kaj konstanta agado la Nacia Pacdefenda Komitato distingis lin per medaloj kaj diplomoj. Sivarov senlace tradukas el Esperanto interesajn artikolojn aperintajn en fremdaj ĵurnaloj kaj revuoj — tiujn tradukojn oni aperigas en la plovdiva kaj sofia gazetaro. Ankaŭ en Esperanto verkitaĵojn li sendas al diversaj eksterlandaj revuoj kaj ĵurnaloj.

Iv. Sivarov estas fondinto kaj unua prezidanto de DE de BEA en Plovdiv. Tiam li organizis du distriktajn konferencojn en Asenovgrad, unu en Râzevo Konare kun granda pacdefenda mitingo, po unu en Rozino kaj Hisar. La DE eldonis „Informan bultenon“, kies kompilinto kaj redaktoro estas li. Pro sia multlanka agado en 1961 Iv. Sivarov ricevis ordenon „Kiril i Metodij“ — II grado. Dum la 40-a Kongreso de BEA li estis proklamita honora membro de BEA.

Ivan Širakov korespondas kun 48 samideanoj el diversaj landoj, gastigas en sia domo alilandajn esperantistojn.

Jam en sia junaĝo Sivarov komencis verki. En 1941 aperis lia libreto „Skizoj sen retuŝo“, mallongigita kaj kripligita de la faŝista cenzuro.

Preskaŭ unu triono de la nova libro de Iv. Sivarov „Mia trezorejo“ estas dediĉita al Esperanto. La aŭtoro rakontas pri interesaj okazintaĵoj el la esperantista vivo. De tiu verko la legantoj informiĝas pri la renovigitaj niaj urboj kaj vilaĝoj, pri nia vivmaniero kaj kulturo, pri la progreso de nia socialisma ekonomio. La libro estas egale interesa kaj por la bulgara kaj por la eksterlanda leganto-esperantisto. Kiel ĵurnalisto Iv. Sivarov lasis daŭran spuron sur la paĝoj de la distrikta gazeto „Oteĉestven glas“.

Iv. Sivarov estas ankaŭ pentristo. En 1950 li finis la dujaran kurson de pentro- kaj aplikata arto. Li estas fondinto kaj sekretario de la pentrokolektivo „Repin“; partoprenas en multaj uzinaj, urbaj, distriktaj, naciaj kaj internaciaj ekspozicioj. Li estas laŭreato de la 3-a kaj 6-a respublikaj festivaloj. En Plovdiv kaj la distrikto estis organizitaj tri liaj memstaraj ekspozicioj. Iuj liaj pentraĵoj troviĝas en Jugoslavio, Francio, Belgio, Nederlando, Pollando, Ameriko, kaj en aliaj landoj.

La vespero estis vere solena. En la programo partoprenis Elka Hristova, Ruska Pavlova, Katja Pavnova, kiuj tra legis pecojn el „Mia trezorejo“. La jubileulon salutis en la nomo de CE de BEA Georgi Mihalkov, en la nomo de revuo „Bulgara Esperantisto“ — Evgeni Georgiev, kiu redaktis la libron, en la nomo de DE de BEA — Z. Bogdanova, de „Almanaho Trakio“ — Penju Jovĉev kaj multaj amikoj-gesamideanoj.

Veselina KURTEVA

AL HOM' BELANIMA! . . .

(Okaze de la 85-jariĝo de Ivan Šivarov)

Al kara kunulo
Šivarov Ivan
deziras ni kore
long-vivon en san'!

Ke plue li ĝuu
la vivon sur Ter'
kaj manku survoje
malbono, sufer'!

Lin ĉiam kuniru
sur la viv-voj',
flor-belo kaj kantoj —
en koro kaj ĝoj'!

Li plu atribuu
por nia Popol'
bel-fruktojn de l'Arto —
de l' homa bonvol'.

Por interpopola
frateco kaj Pac'
li longe batalis
kun amo — sen lac'!

Por bela Movado
de lingv' Esperanto
valorajn li verkis
rakontojn kaj kantojn.

Per pentra la Arto
bel-bildojn li verkis,
kiuj long-vivos
kiel la kverkol'

Ĝis aĝo cent-jara
ke li kun ni estu!
Ke bel-jubileon
al li ni festu! . . .

Dum jaroj mult-multaj
li vivu feliĉe
kaj verkojn de belo
rikoltu tre riĉe!

Al li — Šivarov —
la Hom' bel-anima —
deziras ni kore
Feliĉon senliman! . . .

Toma AJOLOV

ALTA DISTINGO

La 19-an de junio 1986 la veterano de la esperantista movado en Trojan, aktiva batalanto kontraŭ la faŝismo kaj kapitalismo, d-ro Petăr Paĉev fariĝis 80-jara. Lige kun tiu jubileo kaj pro lia kontribuo al la kontraŭfaŝisma batalo kaj al konstruado de la socialismo en nia lando d-ro Paĉev estis distingita de la Stata Soveto de PR Bulgario per ordeno „Popola Respubliko Bulgario“ — II grado.

D-ro Paĉev aktive laboris ankaŭ sur la Esperanto-kampo. Esperantisto jam de 1922, li fordonis multajn fortojn por prospero de la E-movado en Trojan. Multajn jarojn li estis prezidanto de la loka esperantista societo „Balkana Stelo“, kaj nun — ĝia honora prezidanto.

Trojanaj geesperantistoj kore gratulas d-ran Petăr Paĉev pro la alta distingo kaj bondeziras al sia kara veterano sanon kaj fortojn por plua sindona laboro en la vicoj de bulgaraj esperantistoj.

Stellana KAVRĀKOVA

SUR LA VERDA TABULO

DE de BEA en Kjustendil informas, ke IVAN DOBROVSKI jam varbis 30 abonantojn por nia revuo.

Jen imitinda ekzemplo de vere sindona esperantisto kaj fidela amiko de „Bulgara Esperantisto“.

Sincerajn gratulojn kaj dankojn!

„BE“

LAŬ LA NUNTEMPAJ POSTULOJ

Ni malfacile mezuras la aktivecon de la esperantistoj el la distrikto de Sofio nur laŭ ilia nombro — pli ol 700. Ilia sistema laboro dum la tuta jaro karakteriziĝas per strikta observado de la akceptitaj planoj. Kvankam la sidejo de DE de BEA estas en la ĉefurbo Sofio — pro la fakto, ke la distrikto ne havas administran centron (distriktan ĉef-urbon). Ankaŭ la Esperanto-movado en la distrikto ne havas tian centron — pri la unua loko laŭ aktiveco konkuras kelkaj loĝlokoj. Plej multe da organizitaj esperantistoj estas en Botevgrad, Samokov kaj Svoge. En la distrikto funkcias 13 E-societoj kaj 20 lernejanaj E-klubo. Dum la lastaj du jaroj E-societoj estis fonditaj ankaŭ en Bojuriŝte, Godeĉ, Novi Han kaj Pravec, en proceso de formado estas la societoj en Dragoman, Gorna Malina, Etropole kaj Kostinbrod.

En la laboro de la Distrikta Esperantista Organizaĵo oni konstatas seriozajn sukcesojn, plibonigon de la stilo kaj metodoj de laboro. Oni starigis intimajn kontaktojn kun la distriktaj organizaĵoj de Patrolanda Fronto, Komsomolo, Distrikta Konsilantaro pri Klerigo, Bulgara Turisma Asocio k. a., dank' al kies subteno estas realigitaj pluraj iniciatoj. DE de BEA laboras en intima ligo kun fakoj „Amasaj Organizaĵoj“ de la Distrikta Komitato de BKP.

Antaŭe tie ĉi ekzistas malfacilaĵoj — ne sufiĉas konvenaj lokoj por lernado, lerniloj kaj — ne lastloke — kvalifikitaj instruistoj. Malgraŭ ke en la distrikto laboras 45 instruistoj-esperantistoj, el kiuj — 24 diplomitaj E-lektoroj, ili ĉiam ankoraŭ ne sufiĉas por ĉiuj E-societoj. Tial la celo estas preparo de spertaj E-instruistoj el la medio de ĉiu societo. Unu el la plej efikaj formoj montriĝis la foresta studado, organizita kune kun la Distrikta Konsilantaro pri Klerigo. Dum la lernojaro 1985/86 ĝin partoprenis ĉirkaŭ 60 personoj de 1 ĝis III grado, la plimulto el ili — instruistoj en mezlernejoj. Interesigitaj estis ankaŭ iuj oficistoj el la distriktaj administraĵoj. La kurso havas

ĉeestajn lecionojn, ĉiun lastan dimanĉon de la monato en la konstruaĵo de la Sofia Faklernejo pri Nutraĵindustrio. Dum la cetera tempo la gekursanoj lernas aŭtodidakte. Dum la vintraj ferioj 22 foreste studentaj instruistoj lernis la Internacian Lingvon en Etropole. En la sama tempo, kunlaborante kun la Distrikta Konsilantaro de Bulgara Turista Asocio, tie estis organizita seminario por la aktivuloj el la lernejanaj E-klubo. Generale dum la lernojaro 1985/86 en Sofia distrikto estis organizitaj 34 kursoj en 16 loĝlokoj. Kompreneble, la nivelo de instruado ne ĉie estas egale bona. Esperantistojn-aktivulojn oni sendas al kursoj en IEK-Pisaniĉka kaj, eksterlanden, kaj parton de iliaj elspezoj pagas DE de BEA.

La plenkunsidoj de la Distrikta Esperantista Organizaĵo estas libera tribunalo por pritraktado de aktuala problemoj lige kun la disvastigo de Esperanto. Ofte la opinioj estas tute malsamaj, sed tio estas natura, kiam en iu organizaĵo membras homoj diversaj, kun diversaj sperto kaj ebloj. La strebado de la estraro estas apliki modernajn metodojn en la laboro de apartaj societoj. Tiurilate menciinda estas la lasta plenkunsido de DE pri la problemoj de propagando. Estis kreita speciala Komisiono pri Propagando, al kiu oni altiras junajn fakulojn el diversaj sferoj de la vivo. Ĉefa tasko de tiu komisiono estas la laboro por altiro de junaj homoj al la E-movado. Tiurilate bone helpis la eldonita antaŭ la komenco de la lernojaro 1986/87 propaganda faldfolio pri Esperanto.

En sia agado la Distrikta Esperantista Organizaĵo en Sofia distrikto turnas plej grandan atenton al la instrulaboro. La kurso de Esperanto estas ne nur loko, kie oni lernas la lingvon, sed ankaŭ direktpunkto al la estonto. En la E-kurso kreiĝas atmosfero, kiu formas ĉe la kursanoj daŭran intereson aŭ efikas sur ilin tiel, ke ili ne disiĝu kun Esperanto antaŭ ol ili sukcesis ekkoni kaj ekami ĝin.

Atanas ILKOV

FRATA RENKONTIGO

La 7-an de aŭgusto j. k. 8 Sofion alvenis grupo el 35 sovetaj esperantistoj, precepte junuloj el diversaj respublikoj de la frata lando: Rusio, Ukrainio, Litovio, Estonio, Belorusio k. a. Ĉe la stacidomo sofiaj esperantistoj kun floroj kore bonvenigis la sovetajn gastojn.

La sekvan tagon la eksterlandaj samideanoj travigardis la plej interesajn vidindaĵojn de Sofio kaj en la Domo de Soveta Scienco kaj Kulturo renkontiĝis kun ĉefurbaj esperantistoj. La prezidanto de CE de BEA Hristo Gorov, heroo de la socialisma laboro, kore salutis la gastojn kaj la sekretario de la Urba Estraro de BEA Ivan Peev rakontis pri la multflanka laboro de la sofiaj esperantistoj. Poste la gastoj partoprenis la artan programon kun esperantaj kaj sovetaj kantoj. De bulgara flanko sin prezentis Mišo Zdravev, Maria Angelova, Nevjana Krăsteva, Angelina Sotirova, k. a.

La 9-an de aŭgusto la sovetaj grupo forveturis al nia suda ĉefurbo Plovdiv por konatiĝi kun ĝiaj beluloj kaj vidindaĵoj. Poste niaj sovetaj amikoj direktiĝis al Pisaniĉka por partopreni la somerajn kursojn en la Internacia Esperanto-Kurso.

La renkontiĝo kun la sovetaj samideanoj restos neforgesebla por la ĉefurbaj esperantistoj. Ĝi estis plia pruvo pri la jarcenta amikeco inter la bulgara kaj sovetaj popoloj.

FAVORE AL ESPERANTO

Sub la aŭspicio de la vicprezidanto de BATF (Bulgara Asocio pri Turismo kaj Feriado) Todor Nanov okazis renkontiĝo-konversacio inter la Turisma Sekcio ĉe BEA, kunlaborantoj de BATF kaj aliaj funkcianoj de Internacia Turismo. Ĝin gvidis la ĝenerala direktoro de la Centro por turismaj eldonoj Petăr Avramov. La prezidanto de la Turisma Sekcio ĉe BEA Dimităr Mutuŝev konatigis la partoprenantojn kun la okazinta en Budapeŝto Dua Internacia Simpozio pri Esperanto-Turismo. Estis anoncote, ke laŭ la kalendaro de Monda Turismo dum la kuranta jaro okazos 367 diversaj esperantistaj aranĝoj. Speciale pri Esperanto-turismo okupigas ĉirkaŭ 20 organizaĵoj el Anglio, Beneluxo, Kolumbio, Pollando, Turkio, Venecuelo, Bulgario, Greklando, Hungario, Kanado, Aŭstrio, Ĉinio, Danlando, Italio, Jugoslavio, Rumanio kaj Usono. Estis prezentitaj la akceptitaj de la simpozio proponoj.

La ĝenerala direktoro de la turisma komplekso „Albena“ Petăr Apostolov esprimis deziron, ke ilia organizaĵo subskribu kontraktojn kun la firmaoj okupigantaj pri Esperanto-turismo, por certigo de lito en la bonega turisma bazo de la komplekso.

Kiel rezulto de la renkontiĝo la plej granda turisma organizaĵo en nia lando „Balkanturist“ estas preta organizi dum 1987 rondvojaĝon por geesperantistoj.

D. ATANASOV



AL SENARMIGO KAJ PACA KUNLABORO

DEKLARO de Ĝenerala Sekretario de CK de KPSU Miĥail GORBAĈOV, 1986.01.15. Redaktis Dimitrij Perevalov, Juris Rats (Riga, Latva SSR), tradukis Elena Ŝevĉenko, Ljudmila Novikova. Eldonejo de Presagentejo „Novosti“, formato 19,5×12,5 cm, p. 14, Moskvo, 1986.

Daŭrigante siajn leninisman pacpolitikon, emon al amikeco kaj kunlaboro kun la ceteraj landoj la Politika Buroo de Centra Komitato de KPSU kaj Soveta Registaro akceptis komunan ampleksan programon. Informcele Ĝenerala Sekretario de CK de KPSU Miĥail Gorbaĉov faris en formo de Deklaro grandan resumon pri la tuteco de Sovetia propono

pri solvo de la akraj problemoj de senarmigo, por amikeco kaj kunlaboro inter la ŝtatoj kaj nacioj en la mondo. La granda merito de tiu resumo estas la tuteca elmeto de la solvendaj problemoj, por ĉesigi la konkuradon en la milita sfero. Ĉi-tie temas precipe pri ĉesigo de nukleaj eksperimentoj, malpermeso pri preparoj por kosma milito, malaltigo de la nivelo pri milita kontraŭstaro per reduktado de la nukleaj, biologiaj, kemiaj kaj aliaj amas-mortigiloj. La sinceraj pacdefendantoj trovas en tiu verko abundan argumentaron por vastigi la pacan kunlaboron kaj por atingi vivon de la homaro sen militoj.

PRI LA SOVETAJ-FRANCAJ INTERRILATOJ

Respondoj de Miĥail Gorbaĉov al demandoj de la ĵurnalo „l'Humanité“ (intervjuo), redaktis Dimitrij Perevalov, Aleksandr Ŝevĉenko, tradukis Elena Ŝevĉenko, Ljudmila Novikova. Eldonejo de Presagentejo „Novosti“ (APN, formato 19,5×12,5 cm, p. 24, kovrilo viola (ruĝa-blua), Moskvo, 1986.

Antaŭ sia forveturo al oficiala vizito en Francio M. S. Gorbaciov ricevis skribe 13 demandojn far la redakcio de „l'Humanité“. Respondante skribe li invitis kaj transdonis la respondojn al la trio (1986. 02.04.): konsistanta el Rolan Lerŭa (Roland Leroy), membro de Politika Buroo de FKP, politika redaktoro de l'„Humanité“, Jerar Strejĥ (Gérard Streiff), membro de CK de FKP, konstanta korespondanto de „l'Humanité“ en Moskvo kaj Joze For (José Fort),

YOSHIKI MIZUNO

Raporto el Eŭropa Esperantujo



Kiel anoncote en n-ro 6/1986 de „BE“, ni komencas publikigi fragmentojn el la esperanta eldono de la libro „RAPORTO EL EŬROPA ESPERANTUJO“ de prof. Yoshiaki (Joŝiaki) MIZUNO el Japanio. La redakcio konservas lian originalan esperantan stilon. Ni faris nur kelkajn malgrandajn korektojn. Prof. Mizuno estis afabla havigi al ni ankaŭ la japanlingvan eldonon de sia libro, pro kio ni kore dankas al li.

Ni esperas, ke la legantoj havos interesan legadon.

ANTAŬPAROLO

Ĉi tiu tajpita libro estas la resumo de mia preskaŭ unujara vojaĝo tra Eŭropo, orienta kaj okcidenta.

Mi laboras en la Universitato Meiji, en Tokio, kiel profesoro de angla lingvo jam multajn jarojn. Kutime en japanaj universitatoj profesoroj havas privilegiojn studi eksterlande dum certa tempodaŭro, monatoj aŭ jaroj, almenaŭ unu fojon antaŭ sia eksigo. Oni donas al ili monon kaj tempon por la stud-vojaĝo.

Tio estis ankaŭ mia kazo, kaj mi decidis profiti tiun ŝancon por konatigi kun eŭropa Esperantujo. Plue, ĉar mi interesiĝis pri diversaj lingvoj, mi elektis la studtemon „La Lingva Situacio en Eŭropo kaj la Ebleco de Esperanto“.

Mi forlasis Japanion la 1-an de aprilo 1984, kaj revenis hejmen la 9-an de marto 1985. Mi travojaĝis 28 landojn, vizitis ĉirkaŭ 120 urbojn, ĉeestis ĉirkaŭ 50 kunvenojn de verd-stelaj grupoj, kaj konatigis kun ĉirkaŭ 200 esperantistoj. Dum la vojaĝo, mi preskaŭ

ne suferis de malsaneco, nek trafis akcidentojn. Konklude mi povus diri, ke mia vojaĝo estis sukcesa.

Kompreneble, mi havis malfacilaĵojn parte ĉar mi estis jam neĵuna (mi havis 51 jarojn), kaj parte ĉar mi ne multe lertis en la lingvo. Do, se mi havus grandan rikolton el mia vagado, tio estus tute dank' al la helpo de tiuj gesamideanoj, kiuj akceptis kaj prizorgis min sindone. Ili vere montris al mi, ke Esperanto estas vivanta lingvo, per kiu oni povas interamikiĝi ĉiam kaj ĉie tra la vasta mondo.

Yoshiaki MIZUNO,
La 18-an de oktobro 1985, Tokio

ESPERANTO EN „ORIENTO“ KAJ „OKCIDENTO“

Mi celis en mia vojaĝo persone vidi la situacion de Esperanto-movado en Eŭropo. Tial, mi vizitis esperantistojn kaj esperantajn grupojn preskaŭ ĉie, kie mi restis. De tempo al tempo, mi donis prelegon, aŭ akceptis intervjuon de ĵurnalistoj.

administranto de la internacia redakcio de ĵurnalo „l'Humanité“.

Ricevante la skribajn respondojn Rolan Lerŭa mallonge interparolis kun M. S. Gorbačov, dankante kaj pri la akcepto kaj pri la ampleksaj respondoj.

Per siaj demandoj la francaj gvidaj komunistaj ĵurnalistoj celis amplekse informi la francan publikon pri la vivo en Sovetunio, ĉar la amasa, ĉiutaga misinformado far la burĝaj gazetaro, radio, televido en Francio amasigis aron da mensogoj kaj kalumnioj rilate al la reala socialismo. Jam en la unua respondo M. S. Gorbačov amplekse klarigis la diferencon inter la Granda Oktobra Socialisma Revolucio (GOSR) en 1917 kaj la entreprenata nun etapo por akcelita disvolvigo de Sovetunio. La leganto kun streĉa intereso sekvas la klarigojn. La libro estas nepre leginda far la esperantistoj. Ili tre bone scias pri la grava plibonigo de soveti-francaj interrilatoj, komenciĝinta en 1966 (antaŭ 20 jaroj), post la vizito de tiama franca prezidento ĝeneralo De Gol, kiu traktis kun sovetiaj gvidantoj kaj dum deko da tagoj ekskursis tra Sovetunio, inkluzive Siberion (Irkutsk), kie li eldiris, por unua fojo la vortojn „sereniĝo“, „kunlaboro“ k. a. La bonaj soveti-francaj interrilatoj influas favore al ĝenerala etoso en la komplekso de internaciaj politikaj, ekonomi-komercaj kaj kulturaj interrilatoj en Eŭropo kaj eĉ en la mondo kiel tuto.

Canko MURGIN

INFORMILOJ DE BEA

Laŭ decido de la 41-a Kongreso de BEA en la komenco de la kuranta jaro aperis tri novaj asociaj bultenoj en bulgara lingvo. Du el ili estas destinitaj

al neesperantista publiko. Temas pri „Informo-Esperanto“ (16-paĝa, formato 28×20 cm) kaj „Esperanto progresas“ (16-paĝa, formato 20×14,2 cm).

La unua bulteno estas ĉiumonata kaj celas per originale verkitaĵoj informi plej vastajn mediojn de nia socio pri Esperanto — kiel lingvo, historio, internacia kulturo kaj movado kontribuanta al la porpaca batalo de la progresemaj homoj. Sed en la enhavo oni akcentas sur la enlanda, internacia, kultura, eldona agado de BEA; sur la historio de la esperantista movado en Bulgario kaj sur la multflanka aktiveco de la bulgaraj esperantistoj. „Informo-Esperanto“ atingas la amaskomunikilojn, diversajn informajn institutojn kaj organizaĵojn kaj la estrarojn de kulturaj kaj sociaj organizaĵoj. En la ĝisnunaj numeroj per konvenaj artikoloj oni prezentas la agadon de la plej gravaj filioj de BEA: ekonomiaj entreprenoj „Globuso“ kaj „Esperanto“, Internacia Esperanto-Kursejo, Bulgara Esperanto-Teatro, Sofia E-Domo de Kulturo „M. Gorkij“ ka. Estis publikigitaj materialoj dediĉitaj al la decidoj de XIII Kongreso de BKP kaj lige kun tio oni montras la taskojn de la bulgaraj esperantistoj. Oni atentigis ankaŭ pri la graveco de UNESKO-rezolucio favore al Esperanto. La legantoj tralegis interesajn intervjuojn kun la herooj de la socialisma laboro kaj esperantistoj-veteranoj Nikola Aleksiev kaj prof. d-ro Vasil Peevski; kun la merita aganto de kulturo — la kantisto Veselin Damjanov kaj la pentristino Maja Gorova. La redaktoro de la eldono — Slavĉo Davidov atentigas la aŭditorion ankaŭ pri la 100-jara jubileo de Esperanto kaj pri la 80-jariĝo de BEA. Estas interesa iniciato la artikoloj en la rubriko „Bulgaraj verkistoj kaj Esperanto“, verkitaĵoj de Krăstju Karucin.

Mi vidis multajn profesorojn kaj instruistojn, sidis en la klasoj de fremdaj lingvoj kaj interŝanĝis opiniojn pri fremd-lingva edukado.

Ĉar mi ĉefe kontaktis kun ordinaraĵoj: laboristoj, oficistoj, pensiuloj, dommastrinoj kaj studentoj, mi povis aŭdi senpere la krudan voĉon de la popolo. Tio estis la plej valora rikolto de mia vojaĝo. Dank' al Esperanto kaj la samideana etoso inter verd-steluloj, mi spertis multe, kion mi ne povus sperti, se mi estus turisto parolanta nur angle.

Mi renkontis diversajn esperantistojn. Plejparto de ili estis mezaŭt-alt-aguloj, kaj oni ĉie plendis pri maljuniĝo de Esperanto. Ĝenerale ili estas sobraj, preskaŭ ĉiuj ne fumas, trinkas nur malmulte kaj mangas tre simple. Tamen, ili ne estas tro severaj, nek rigoraj, akceptas alilandajn samideanojn kun milda mieno kaj zorgas la gastojn pri gvidado, mango trankonito ktp., tre volonte.

Mi havis impreson, ke en „Oriento“ kaj „Okcidento“ prosperas Esperantismo pli vigle ol en Japanio. Rimarkinda estis la solida organizo kaj vigla agado en la „Oriento“. La ĉefa kaŭzo por tio troviĝas, interalie, en la subteno flanke de la ŝtato aŭ registaro. La salajro de funkciuloj en Esperantaj organizoj estas parte pagata el la oficiala kaso. Ankaŭ oni ricevas publikan helpon por eldono de libroj en kaj pri Esperanto.

Konkerne enkondukon de Es-

peranto en lernejojn, la „Oriento“ estas progresinta, kaj en kelkaj landoj estas jam aprobita la lingvo en la eduk-programo de devigaj lernejoj.

Aliflanke, en la „Okcidento“, spite de malhavo de publika subteno, daŭre marŝas la Movado. Precipe multenombres esperantistoj en Anglio, Francio, Germanio, Hispanio, Italio, Nederlando kaj Svedio.

Ĝenerale, la Esperanto-movado en Eŭropo superas ne nur en kvanto, sed ankaŭ en kvalito. Kompreneble, ekzistas malsamaj gradoj de kapableco laŭ individuoj, sed plejparto de tiuj, kiujn mi renkontis, parolis la lingvon tre flue. Preskaŭ ĉiukaze oni ne krokodilis. En kelkaj kursoj de mi vizititaj, oni instruis Esperanton per Esperanto al la kursanoj post 4 ĝis 5 po-semajnaj lecionoj. Konsiderante la similecon de eŭropaj lingvoj al Esperanto, tia fenomeno estas nemirinda, sed bedaŭrinde tio ne estas facile realigebla en Japanio.

Dum mia longa vojaĝo mi konatigis kun multaj rimarkindaj samideanoj.

Nun antaŭ miaj okuloj image aperas grandioza vido, en kiu ĉiuj tiuj homoj interbabiladas per unu sola lingvo, Esperanto. Ĉi tie jam malaperis landlimoj. Vere efektiviĝis la estonta komunumo de homaro, mond-ŝtato bazita sur interkompreno kaj amikeco, alme-

naŭ rilate al la lingvo.

Mi eklernis Esperanton jam antaŭ dek kelkaj jaroj, sed ĝis antaŭ nelonge ĝi estis por mi nur lingvo de libroj. Nun, post mia vojaĝo, mi reale sentas, ke Esperanto estas vivanta lingvo, same utila kiel naciaj lingvoj.

Mi kredas, ke la plej bona maniero, per kiu mi povas esprimi mian dankemon al miaj amikoj-esperantistoj estas, ke mi plene utiligu mian sperton por la aferoj de Esperanto. Mi klopodos tiel ke laŭeble multaj homoj komprenu la signifon de la Lingvo Internacia kaj ties utilecon kaj idealon, kiu celas harmonion kaj kunhelpon de la popoloj sur la terglobo.

SOVETUNIO

Leningrad

Forlasinte Pekinon, mi trapasis la dezerton de Mongolio per trajno, kaj atingis la urbon Irkutsk la 6-an de aprilo, kie mi restis du noktojn. Mi ĝuis la panoramon de la granda lago Bajkal, kies surfaco estis ankoraŭ tute kovrata de glacio. Post ĉirkaŭ 4 tagoj de fervoja vojaĝo tra Siberio, mi alvenis al Moskvo, kie mi restis tri noktojn.

Nun komenciĝis la VOJAĜO. La 15-an de aprilo matene sur la perono de la stacidomo Leningrad min akceptis tri esperantistoj-lelingradanoj.

„Informo-Esperanto“ respondas al la bezono pri eldono de priesperanta informado kaj propagando al neesperantistaj medioj en nia lando. Tiamaniere plialtigas la aŭtoritato de BEA kaj ni povos atendi komprenon kaj helpon fare de diversaj institucioj.

La starto de „Informo-Esperanto“ estas bona, sed mi povus rekomendi: pli vastajn kontaktojn kun la esperantistoj el la lando, plibonigon de la teknika arango kaj malpli da emocio en la artikoloj, ĉar la faktoj mem estas sufiĉe elokventaj.

La enhavo de „Esperanto progresas“ konsistas el tradukaĵoj el la internacia Esperanto-gazetaro. Ili informas la neesperantistan bulgaran legantaron pri interesaj Esperanto-arangoj kaj eventoj en la mondo, sed, kiel klarigis la redaktoro Georgi Mihajlov — prioritaton havas la komunikoj pri kulturaj eventoj. La eldono aperas ĉiun duan monaton. Jam estis publikigitaj: intervjuo kun la amerika verkisto Harry Harrison, kun William Auld, materialoj pri la disvolvigo de la E-movado en Sovetunio kaj Kubo, pri la instruado de Esperanto kaj pri turismo pere de la Internacia Lingvo. En la nove aperinta kvara numero la legantoj legis pri la originala E-romano „Ombro sur interna pejzaĝo“ de la verkistino Stamenka Stimec kaj pri la tataara verkisto Fatih Amiran — aŭtoro de la unua Esperanto-lernolibro por tataroj. Ĉiuj materialoj estas trafe elektitaj kaj lerte tradukitaj.

La bultenon oni sendas al DE de BEA, kiuj disvastigas ĝin al distriktaj institucioj kaj unuopuloj, al bibliotekoj kaj amaskomunikiloj. La redaktoro devas turni atenton al ripetado en la titoloj kaj subtitoloj („Esperanto progresas“, „Esperantistaj novaĵoj“).

Ĉar la publiko kaj celoj de ambaŭ bultenoj estas

la samaj, laŭ mi estus bone se ili unuiĝus. Tiamaniere estos ŝparitaj ne nur mondrimedoj kaj fortoj, sed oni turnos pli da atento al tia bulteno, kiu povos transformiĝi en interesan riĉenhavan revuon por neesperantista legantaro.

La tria bulteno „Asocia informo“ (16-paĝa, formato 21×15 cm) estas eldonata precipe bulgarlingve. La redaktoro Veselin Rizov strebas fari ĝin tribuno de ĉiu esperantisto, ĉiu societo kaj ĉiu distrikta estraro. Tiu eldono, kiu aperas ĉiunmonate, disvastigas nur inter bulgaraj esperantistaj medioj kaj samkiel la aliaj informiloj estas sendata senpage. Ĝi celas la pliriĉigon de la informado inter la bulgaraj esperantistoj. Sur la bultenaj paĝoj oni interŝanĝas sperton, pridiskutas organizajn problemojn; estas publikigitaj ankaŭ oficialaj dokumentoj de CE de BEA. Vere interesa estis la serio de publikaĵoj pri la graveco de ĝusta informo, kiel la kibernetiko helpas la informadon, kazoj de misinformado — kun konkretaj ekzemploj ktp. Intereson vekis la artikoloj de la ĝenerala sekretario de BEA Dimitar Papazov: „Planado — grava faktoro por la regula funkciado de la DE de BEA“ kaj „La uzado de la komputertekniko por la registrado de BEA-membroj“. „Asocia informo“ estas vera helpanto al la aktivuloj de bulgara E-movado. Ĝi portas la „klimaton“ el la sociaj kaj niaj sociaj medioj kaj kunordigas la agadon de la organizitaj esperantistoj. Miaopinie, en la bulteno devas esti publikigitaj materialoj, kiuj traktas eventojn kaj E-arangojn el vidpunkto organiza, sed ne ĝenerale. Rekomendinde estas, ke oni evitu arkaikajn ornamaĵojn en la arta arango de la bulteno, kio certe plibonigos ĝian aspekton.

Maria JANKOVA



En la hejmo de familio Kauts (dekstre gesamideanoj Palu). Foto: Yoshiaki Mizuno

La ĉefa zorganto pri mi estis s-ino Varvara Cvetkova, 74-jara, kiu parolis Esperanton tre flue. Varvara estas la postvivanto de la terura sieĝo de Leningrad, 900-taga, dum milito. Varvara akompanis min preskaŭ la tutan tempon dum tri tagoj, kiujn mi pasigis en la urbo. Ŝi naskiĝis kaj kreskis en Leningrad kaj tial ŝi konas ĉiujn angulojn de tiu moderna kaj antikva urbo. Ŝi rakontis interesajn faktojn pri konstruaĵoj, muzeoj, parkoj, pontoj, stratoj, monumentoj kaj aliaj. Per ŝia gvidado mi vagadis tra la urbo kaj al mi ŝajnis, ke la antikva etoso de

rusa literaturo, la atmosfero de la verkistoj Gogol, Dostoevski kaj aliaj klare aperis antaŭ miaj okuloj. Fakte mi sentis la veran spiriton de la rusoj malnovaj kaj nuntempaj. Pri mi zorgis ne sole Varvara. Ŝi estas, por tiel diri, la estro de la esperantista grupo en sia distrikto. Laŭ ŝia kalkulo en Leningrad loĝas ĉirkaŭ 160 esperantistoj organizitaj. Ŝi telefonis al multaj gesamideanoj, ŝiaj kunlaborantoj, kaj oni konkure venis por zorgi pri mi. Ĉiuj ili parolas Esperanton tre nature, kaj mi bedaŭris, ke mi ofte ne povis sekvi ilian rapidan rakonton.

Jen estas nur kelkaj el tiuj, kiuj afable helpis min dum mia restado:

Saŝa (Aleksandr Muraŝev), kompetenta junulo, laboras en iu entrepreno. Li povus esti profesia ĉiĉerono, ĉar li konas tre multe pri vidindaĵoj de la urbo. Inter aliaj li montris al mi la imponan Palaco de Somero en la urbo Puŝkin iom for de Leningrad.

Ira (Irena Sedova), 19-jara studentino-oficistino, kiu deziras esti profesia gvidisto por germanoj. Ŝi estas litere genio de lingvoj. Malgraŭ ŝia juneco, ŝi jam flue parolas germanan lingvon kaj ankaŭ polan, francan, ukrainian, kaj aldone ŝia Esperanto estas perfekta! Ŝi kondukis min, interalie, al la fama ŝtatuo „Bronza Rajdanto“ (Petro la Unua, kiu estas la mo-

delo de la bone konata poemo de Puŝkin.)

Kiril Jarmarkin, ĉirkaŭ 40-jara oficisto de iu firmao por internacia komerco. Li posedas sufiĉan konon pri pentraĵoj rusaj kaj okcident-eŭropaj. Li gvidis min en la grandega Palaco-Muzeo Ermitaĝo dum du-tri horoj. Li revenis hejmen el Kubo en Mez-Ameriko, nur antaŭhierau, sed li memvole dediĉis al mi ŝian lastan libertagon. Li devis rekomenci laboron jam morgaŭ.

La 16-an de aprilo, post ĉirkaŭ rigardo de la urbo, Varvara akompanis min al la vespera kurso de Esperanto, en la Politeknika Instituto. Tie troviĝis 15 kursanoj, elementaj kaj mezaj. Oni petis min rakonti iom pri Japanio kaj la Esperanto-movado tie, kaj mi parolis duonhoron. Felice mia rakonto ŝajne plaĉis al la aŭskultantoj.

Laste, lasu min transdoni la mesaĝon de Leningradaj samideanoj: ili deziras marŝi kune kun japanaj esperantistoj kontraŭ militarismo kaj nuklea armado, kaj ankaŭ ke la mond-paco estu la plej grava tasko por ĉiuj esperantistoj bonkorecaj.

Tallinn

La 18-an de aprilo, frumatene, mi atingis la stadidomon de Tallinn, la ĉefurbo de Soveta Estonio, kie akceptis min ĉirkaŭ 10 amikoj-esperantistoj.

Mi planis resti en tiu ĉi urbo

KULTURCENTRO AKTIVADAS



Junaj esperantistoj el Razgrad.

Foto: Pavel Gančev

La Esperanto-Domo de Kulturo en Razgrad estas la dua en la lando, post tiu en Sofio. Tiu fakto ĝojigas ne nur la esperantistaron en la distrikto, sed ankaŭ la socion en Razgrad. Malfermita nur antaŭ du jaroj, la Domo de Kulturo farigis vera fajrujo de interesaj aranĝoj. Funkcias diversaj laŭ aĝo kaj intereso grupoj: „Juneco“, „Turistoj-esperantistoj“, „Virinoj-esperantistoj“ kaj „Veteranoj“ k. a.

Ĉe la Domo agadas kvar kluboj por gelnantoj el la mezlernejoj: „Hr. Botev“, „V. Kolarov“ kaj „P. Hilendarski“ kaj unu civitana kurso de Esperanto. Ĉe la kluboj por internacia amikeco en la samaj lernejoj oni organizis lernejanajn E-grupojn. La partoprenantoj en ili renkontigis ĉi-somere en la Komunuma Centro „Standardo de la paco“, kie recitis kaj kantis esperantlingve. Inter la junaj geesperantistoj estis ankaŭ la 6-jara Neli Dejanova, gajninta unuan

premion por recitado en la ĉi-jara XIX Revuo de Esperanto-Parolo kaj Kanto en Razgrad.

Jam manifestigas la bonaj rezultoj de la propaganda agado de la centro kiel faktoro por disvastigado de la E-movado en Ludogorie. Oni aplikos diversajn agadformojn: lekciojn, tematikajn vesperojn, recitalojn, renkontiĝojn-dialogojn kun esperantistoj-veteranoj, aktoroj, pentristoj, verkistoj...

La 18-an de junio ĉ. j. okazis kvizo kaj recitalo, dediĉitaj al la vivo kaj agado de Georgi Dimitrov — gvidanto kaj instruanto de la bulgara popolo. Granda parto de la partoprenintoj en la kvizo aliĝis al la „Vespero de la juna talentulo“, organizita kune kun la-loka Klubo de la Kulturagantoj. Ĉi-jare okazis ankaŭ neforgeseblaj por la esperantistoj el Razgrad renkontiĝoj kun la heroo de socialisma laboro Simeona Nedelčeva, la franca esperantisto kaj pedagogo Jacques Masson (Jak Mason); la kantistino Svetla Stoeva k. a. Vekis intereson la vesperoj laŭ diversaj temoj: „Vespero de la virino kaj patrino“, dediĉita al la Internacia Tago de Virino; „Beleco kaj harmonio en nia hejmo“, organizita kune kun legejo „Napredak“ (Progreso) kaj la Komunuma Centro „Standardo de la paco“; vespero dediĉita al la populara pentristo Ĉanko Lavrenov k. s. Antaŭ nelonge en la E-Domo de Kulturo estis organizita ankaŭ kurso pri „ikebana“ kun lektoro Tonja Stefanova. Parto de la partoprenantoj, kiuj ne estas esperantistoj, kune kun la intereso al la floroj manifestis sian deziron lerni la Internacian Lingvon.

Dobrinka ZAGOROVA

dum unu semajno, kaj la unuajn tri tagojn pasigis kun s-ro Avo Suurmets, kiu estas mia longjara korespondanto. Avo ĉiam akompanis min kaj montris al mi multajn vidindaĵojn de la urbo. Ĉar li loĝas tre malproksime de Tallinn, preskaŭ 6 horojn per aŭtobuso, li prenis ferion dum tri tagoj nur por renkonti min kaj li dediĉis al mi eĉ la lastan momenton, kiam ni devis adiaŭi je la 3-a horo posttagmeze de la 20-a tago. Mi estis tute kortuŝita de lia varma amikeco esperantista.

Tallinn estas sufiĉe granda urbo kun loĝantaro de 450 000, en la plej malgranda respubliko de Sovetunio, Estonio, kies populacio nombras nur iom pli ol miliono. Mi tre ŝatas tiun urbon kun malnovaj turoj kaj kasteloj, ĉiuj ŝtone konstruitaj.

Ankaŭ al mi plaĉis ĝiaj kvazaŭ mez-epokaj domoj, kaj mallargaj stratoj, kiuj loĝas mian imagon al la jam mortinta tempo, la medio de kavaliroj kaj simplaj kamparanoj. Post unu tago de ripozo mi vizitis la hejmon de ges-roj Johannes kaj Raja Palu. S-ro Palu, 71-jara pensiulo, nun loĝas kun edzino en modesta, sed agrabla domo, al kiu apartenas sufiĉe granda ĝardeno. Ĝi situas en trankvila vilaĝo ekster la ĉefurbo.

La geedzoj ambaŭ tre flue parolas Esperanton, precipe s-ro Palu babiladis la tutan tempon senĉese kaj rapidege, kvazaŭ maŝinapililo! Mi aŭdis de li pri la historio kaj la nuna situacio de la esperanta

movado en Estonio. La bona kujrita porkaĵo kaj iom acidita brasiĉaĵo, kiujn ili speciale preparis por mi, gustis la plej bona en la mondo. La 23-an de aprilo, mi vidis s-ran Jaan Ojalo. Li havas 70 jarojn kaj estas konata kiel eminenta aktivulo en la lando. Laŭ lia gvido mi vizitis la muzeon, kie troviĝas ekspozicio de la nuntempaj estonaj pentraĵoj.

Poste li kondukis min al la vasta tombejo en pinarbaro, kaj montris al mi tombojn de politikistoj, verkistoj, artistoj kaj aliaj. Ĉiuj tomboj estis modestaj, kaj ĉi-tie oni ne kutimas kremaci la kadavrojn, mi aŭdis.

La sekvan tagon min invitis s-ro Kauts al sia domo. Tie estis ankaŭ gesinjoroj Palu, pri kiuj mi jam skribis. S-ro Kauts posedas propran aŭton kaj veturigis min de kaj ĝis la hotelo. En lia domo atendis min lia tre bonkora edzino kun ege bongustaj manĝaĵoj preparitaj en tradicia maniero. Laŭ miaj spertoj ĝis nun mi erare pensis, ke esperantistoj en Sovetunio estas ĉiuj tre „stoikaj“, kaj nek fumas nek trinkas alkoholaĵojn. Sed tamen al mia ĝojo, oni drinkis ĉe s-ro Kauts, kaj do vi povas imagi kian plezurajn vesperon mi havis en gaja atmosfero. Ni parolis pri diversaj aferoj kaj ankaŭ rigardis la programon de la televido, kiu tre similis al popularaj en Japanio programoj de „kvizo“. Jen estas ankoraŭ pruvo, ke homeco similas ĉie en la mondo. Mia opinio, tio estas ĵus

la valora bazo por mondpaco kaj Esperanto.

Mian lastan lagon en Tallinn mi ripozis kaj preparis min por forveturo dumtage.

Je la 5-a posttagmeze venis vidi min d-ro Vjaĉeslav Hromov kiu estas lingvisto kaj ankaŭ instruas Esperanton. Docento en la universitato, li scipovas multajn lingvojn, kaj eĉ interesigas pri japana. Ni diskutis dum ĉirkaŭ du horoj pri metodoj de Esperanto-instruado kaj aliaj temoj rilataj al Esperanto-movado en ambaŭ landoj. Mi aŭdis, ke Estonio estas la sola respubliko en Sovetunio, kie Esperanto estas oficiale enkondukita en lernejoj. Nun ĝi estas instruata en 27 lernejoj al ĉirkaŭ 350 lernantoj ĉiujare. Ankaŭ Estona registaro tre simpatias al la lingvo kaj eldonas librojn en kaj pri Esperanto (jam 9 titolojn). La aferoj bone progresas, sed ne sufiĉas instruistoj kaj lerno-materialoj, oni plendis.

Vespere mi partoprenis por la dua fojo en la semajna kunveno de Tallinna Esperanto-Klubo, kie ĉeestis ĉirkaŭ 40 gesamideanoj. Mi faris etan salutparolon kaj prezentis kelkajn popolkantojn per sonbendoj.

Malfrue en la nokto adiaŭis min ĉe la stacidomo s-ro Ojalo, ĉefo de la klubo, kun donacoj de afablaj klubanoj.

Adiaŭ, Tallinn! Eternaj estu karaj rememoroj!

(Daŭrigota)

ESPERANTO-TERMINOJ POR LA FORSTSCIENCO

Rezulte de la publikigita materialo „Nova ŝanco por terminologio“ en n-ro 9/1986 de „BE“, ni ricevis la suban artikolon de s-ro K. H. Simon el GDR, kiu partoprenis la ĉi-jaran ISEU en Veliko Târnovo kaj prelegis pri la koncerna temo. La redakcio konsideras tiun artikolon kiel intersaĝon de konkreta sperto sur la kampo de Esperanta terminologio kaj publikigas ĝin kun iuj mallongigoj.

„BE“

En la jaro 1982 en Eŭropo kelkaj esperantistoj-forstistoj komunikigis inter si, ke jam estas tempo fondi Internacian Forstistan E-Fakgrupon. Ni samopiniis pri tio, ke unu el la ĉefaj taskoj de tiu fakgrupo estu la kolekto, respektive la kreado de esperantlingvaj forstaj terminoj.

En la jaro 1982 13 forstistoj interkonsentiĝis komenci la laboron pri forstfaka vortaro.

Dum la kreado aŭ tradukado de fakterminoj certe ĉiu baldaŭ rimarkis, ke tio estas malfacila afero, ĉar la nocioj troviĝas ekster la sfero de la lingvo de la ĉiutaga vivo. Krome la nocioj en la diversaj lingvoj kaj landoj ne ĉiam estas samsciencaj, sed plimalpli de variita senco. Tial ne estas mirige, ke en vortaroj Esperant-lingvaj, eĉ en PIV, estas troveblaj indikoj, kiuj ne kontentigas kompetentulojn.

Tiu ĉi sperto sekvigis tion, ke en 1983 konsideris necesa premiso krei la forstajn terminojn surbaze de la difino de nocio. Bedaŭrinde sur la kampo de la forstscienco kaj forstmastrumado ne ekzistas kompleta internacia akordigita difino de la nocioj. Ekzistas ja ekde 1971 angla terminaro kun difinoj aprobitaj de unuigita FAO/IUFRO-komitato por forsta bibliografio kaj terminologio. Pli malfrue oni kreis francan kaj italan, kaj ekde 1983 eĉ ĉinan tradukon. Sed evidente pro malkontenteco pri la ekzistantaj terminaroj oni rekomendis revizii la aferon. En la kadro de la landoj de la Konsilio de Reciproka Ekonomia Helpo ekzistas nur malmultaj akordigitaj normoj por nia fako. Laŭ tiu stato necesas kaj necesas krei Esperantlingvajn difinojn utiligante jam ekzistantajn difinojn, aprobitajn de IUFRO, kaj jam ekzistantajn nacilingvajn difinojn kadre de naciaj normoj. Se difinoj ne ekzistas, necesas, tutnove elabori la bezonatajn difinojn. Ni klopodas fari difinojn por nocioj, kiuj estas ĝenerale uzataj aŭ estas utilaj en la forstscienco resp. — mastrumado. Ni estas certaj, ke estos ankoraŭ pli longa vojo ĝis kiam estos atingata konten-

tiga solvo por la plej gravaj nocioj. Plej komplika estas la prilaborado de tiaj nocioj, kiuj koncernas aŭ tuŝas la forstekonomion. En la du dominantaj ekonomiaj sistemoj la nocioj kaj difinoj estas kelkfoje tute diversaj.

La Internacia Forstista Rondo Esperantlingva, kiel la fakgrupo nun nomiĝas, klopodas pri tio, ke forstfakuloj parolantaj laŭeble plej multajn diversajn nacilingvojn partopreni la elaboradon de la esperantlingvaj forstterminoj. La latinida vortrezoro ja estas ĉefa bazo de Esperanto kaj la latina lingvo estas grava bazo en terminografio pri sciencaj nocioj, sed nuntempe ankaŭ la aliaj nacilingvoj povas kaj devas kontribui al pliriĝo de Esperanto.

Montriĝis, ke ne estas fareble diskuti la diversajn proponojn por la unuopaj nocioj kadre de ĉiuj interesitaj kunlaborantoj. Estas profitige prilaboli la termino-proponojn por malgranda komisiono konsistanta plej bone el reprezentantoj de diversaj nacilingvoj. Fakte nuntempe nia komisiono, la aŭtoroj de tiu artikolo, estas du germanlingvaj kaj unu bulgarlingva forstistoj.

La elekto de la plej trafaj el la prezentitaj proponoj estu farota nur laŭ lingvaj kaj fakaj vidpunktoj, kaj ne laŭ la plimulto-principo. Plimultaj rilatoj povus ludi rolon ĉe la decido pri lingve samvaloraj proponoj.

Estis la demando, ĉu ni proponu nur unu termino-proponon aŭ plurajn. Ni decidis, se ekzistas du aŭ kelkaj samvaloraj proponoj, indiki tiujn ĉi.

En la faklingvo oni ĉiam preferu internaciismojn por la elekto kiel Esperantlingvaj terminoj. Sed internaciismoj estas relative raraj en la forsta fakterminaro. En kiu kazo oni enkonduku novajn vortojn por esprimi faknociojn? Tiuj ĉi novaj vortoj rilatas al novaj radikoj aŭ al oficialigitaj radikoj kun nova signifo.

Ni kompreneble estas konvinkitaj, ke nian laborrezulton ekzamenu Esperanto-lingvistoj. Ili decidu pri tio, ĉu la koncerna fakvorto lingve estas korekta. Ĝis hodiaŭ ni ankoraŭ serĉas lingvistojn, kiuj volas kaj povas helpi nin. Kiu esperantlingva traduko per iu fakvorto estu valida kaj fine uzata, pri tio nur la koncerna fakularo kaj la praktika uzado povas decidi.

K.H.SIMON, I.ULLRICH, B.D.MARINOV



GASTE AL „VEKIGO“

E-societo „Vekigo“ en urbo Sumen solene festis la 24-an de majo — la tagon de la slava kulturo. Prelegis la sekretario de la societo Ĥristo Tonev — kursgvidanto de la tuturba kurso por komencantoj. Al la sukcese finintaj gekursanoj (unua grado) estis disdonitaj diplomoj kaj donacitaj libroj pri Georgi Dimitrov.

La ŝumenaj esperantistoj esprimis estimon al la E-veterano Atanas Bojaĝiev — eksinstruisto kaj eks-

ĉefredaktoro de la distrikta ĵurnalo „Sumenska Zorja“ (Sumena Aŭroro). Li estis ankaŭ multjara prezidanto de DE de BEA en Sumen. Antaŭ nelonge, okaze de lia 80-jariĝo, li estis distingita far la Ŝtata Soveto de PR Bulgario per ordeno „Popola Respubliko Bulgario“ — dua grado.

Al la ŝumena esperantistaro gastis la ĝenerala sekretario de BEA Dimitar Papazov, kiu en la nomo de CE de BEA salutis la ĉeestantojn kaj atentigis ilin pri la gravaj sukcesoj de la bulgara esperantistaro dum la periodo post la Aprila Plenkunsido de la Centra Komitato de Bulgara Komunista Partio (1956) kaj pri la antaŭstarantaj taskoj lige kun la decidoj de la XIII Kongreso de BKP. D. Papazov rakontis pri la aprobita en Sofio fine de 1985 Rezolucio de UNESKO favore al la E-movado kaj okaze de la 100-jariĝo de Esperanto. Li faris ankaŭ konkretajn rekomendojn al la loka esperantistaro por plua sukcesa laboro.

Ĥristo TONEV

KARAJ LEGANTOJ,
LA ABONKAMPANJO POR 1987 JAM KOMENCIGIS!
NE PROKRASTU! ABONU REVUON
„BULGARA ESPERANTISTO“,
MONATA ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

„BULGARA ESPERANTISTO“ ESTAS UNU EL LA PLEJ MALNOVAJ REVUOJ EN LA MONDO — FONDITA EN 1919

„BULGARA ESPERANTISTO“ TRAKTAS AKTUALAJN PROBLEMOJN DE LA E-MOVADO EN BULGARIO KAJ EN ALIAJ LANDOJ

„BULGARA ESPERANTISTO“ ESTAS LIBERA TRIBUNO DE LA LEGANTOJ

„BULGARA ESPERANTISTO“ DISPONIGAS AL VI INTERESAJN, ORIGINALE VERKITAJN EN ESPERANTO AŬ TRADUKITAJN LITERATURAJN VERKOJN DE BULGARAJ KAJ FREMDAJ AŬTOROJ

Jarabono: por Bulgario — 2,90 lv.
por socialismaj landoj — 5,42 lv.
por ĉiuj ceteraj landoj — 5,90 lv. (aŭ egalvaloro en nacia valuto)

ABONU TUJ PERE DE R E P !

ABONIGU ANKAŬ VIAJN EKSTERLANDAJN AMIKOJN! LA PLEJ BELA DONACO POR ILI ESTOS JARABONO DE „BULGARA ESPERANTISTO“ POR 1987!

ALILANDAJ LEGANTOJ POVAS ABONI LA REVUON ĈE LA CENTRA OFICEJO DE UEA — Nieuwe Binnenweg 176, 3015 — BJ Rotterdam, Nederlando

NE FORGESU: NUN PLEJ GRAVA TASKO DE ĈIU E-SOCIETO, DE ĈIU E-AKTIVULO ESTAS NEPRE PLENUMI LA DECIDON DE LA 41-A KONGRESO DE B E A: ĈIU ESPERANTISTO — ABONANTO DE „BULGARA ESPERANTISTO“!

HONORE AL LA 100-JARIĜO DE ESPERANTO — VARBU PLIAJN NOVAJN ABONANTOJN DE „BULGARA ESPERANTISTO“, EN BULGARIO KAJ EKSTERLANDE!

LASTA LIMDATO — 1-A DE DECEMBRO 1986

ATENTU! LA ELDONKVANTO ESTAS LIMIGITA!

LA REDAKCIO

VILAGA EKSPOZICIO

En sia kunsido de la 2-a de aprilo j. k. 14 membroj de societo „Amikeco“ en vilaĝo Zimnica, Jamboŭ-distrikto, decidis organizi en la loka legejo etnografian ekspozicion. Kun la helpo de Patrolanda Fronto la esperantistoj-entuziasmoj kolektis multajn malnovepokajn objektojn: vestojn, agrikulturojn, k. a.

La ekspozicio estis malfermita la 8-an de julio okaze de la tutpopolaj balotoj en Bulgario por popolaj reprezentantoj en la Naŭa Popola Parlamento, por komunumaj konsilantoj kaj asessoroj.

La ekspozicio konsistis el du partoj: la unua — de E-libroj kaj afiŝoj kaj la dua — objektoj el la pasinta vilaĝa vivmaniero.

Dum la serĉado kaj aranĝado de la ekspoziciaĵoj plej aktive laboris Elka Georgieva, Jordan Banĉev, Veselin Jordanov kaj Pejĉo Panajotov. La vilaĝanoj tulkore ĝuis tiun originalan ekspozicion.

Jordan BANĈEV

INTERESA JARKUNVENO

La 27-an de majo j. k. en Svoge, distrikto de Sofio, okazis jarkunveno de la urba E-societo „Amikeco“. Raporton pri la jaragado de la societanoj faris la prezidantino Elena Radenkova. La membroj aprobis agadplanon por la dua duonjaro.

La kunvenon partoprenis la estraranoj de DE de BEA: Ivan Ĉulev — prezidanto kaj Radoslav Paraŝkevov — sekretario. Ĉeestis ankaŭ la veteranoj-esperantistoj: d-ro Moraresku, Nikola Mladenov, Jivko Petrov kaj Donka Draganova — partoprenantino en la Patrolanda Milito.

Por la unua fojo al la societo gastis samideanoj el Hungario. Ili trarigardis la urbon kaj kune kun la lokaj esperantistinoj metis florkronon antaŭ la monumento de Diĉo Petrov — legenda partizanestro.

Krasimira MINĈEVA

LA KOLEKTADO DAŬRAS

En sia n-ro 1/1986 „Bulgaro Esperantisto“ anoncis pri la organizoto de mi ekspozicio — sub la aŭspicio de BEA kaj de la Asocio de Bulgaraj Filatelistoj. La ekspozicio estas dediĉita al la 100-jara jubileo de Esperanto kaj oni antaŭvidas aranĝi la postkartojn en tri sekcioj:

1. D-ro L. L. Zamenhof sur bildkartoj
2. Bildkartoj kun surskriboj en Esperanto
3. Kongresurboj (kie okazis UK en Esperanto)

Mi kore dankas al multaj gesamideanoj el Bulgario kaj el eksterlando, kiuj favore enis al mia peto, kaj per siaj sendaĵoj pliriĉigis la organizotan jubilean Esperanto-ekspozicion.

Mi petegas ĉiujn, kiuj posedas konvenajn p. k., sendu ilin al mia adreso: Hipodruma 34-A

1612 Sofio, Bulgario

Georgi LITOV,
fervojisto-kolektanto

El nia leterkesto

„DANKON PRO LA-LIBROJ“

Estimata redakcio,

Antaŭ nelonge mi ricevis leteron de mia japana amiko Mituo Nisida. Jen kelkaj linioj el ĝi, kiuj eble ekinteresis vian legantaron.

„Kun ĝojego mi ricevis du librojn: „Homoj, antaŭen!“ kaj „Stelisto de persikoj“. Koregan dankon! La poemaro „Homoj, antaŭen!“ estas facile legebla kaj kortuŝa. Ricevinte ĝin, mi tuj eklegis kaj tralegis unuspire la tuton. Precipe interesigaj estas „Panjo“, „30 centimoj“, „Generacio, postenu!“ kaj „Sur la unua linto“.

Amike: Petko ARNAUDOV,
Pazarĝik

El Sovetunio

XXIII BALTA E-TENDARO

En Smalininkai (Litovia SSR) de la 10-a ĝis la 20-a de julio 1986 okazis XXIII Balta Esperantista Tendaro. La Tendaron partoprenis preskaŭ 500 personoj el ĉirkaŭ 120 urboj de 12 respublikoj de USSR. Tie renkontiĝis Kovalenko el Omsk, 2,5-jara — la plej juna esperantisto, kaj la plej aĝa partoprenanto — 85-jara P. Staŝys el Kaŭnas. Laŭ esperantista staĝo la plej maljuna estis M. Mandrik el Gomel, kiun aktive okupigas pri Esperanto jam 65 jarojn.

La programo de la tendaro estis enhavoriĉa. Dum la somera universitato, gvidata de moskvano S. Kuznecov, estis prezentitaj proksimume 50 prelegoj pri interlingvistiko, medicino, tekniko, turismo, k. a. Dum la tendaro funkciis paroligaj kaj perfektigaj kursoj, gvidataj de tomskano A. Slijafer; seminarioj de klubestroj (BET-23 partoprenis 40 klubaj prezidantoj el Sovetunio) — sub la gvido de V. Seguru (u. Ivanovo); tradukista seminario, kiun gvidas J. Ojalo (u. Tallinn). La dommastroj organizis unutagan perbusan ekskurson tra pitoreskaj lokoj de Jurbarkas-regiono. La partoprenantoj havis eblecon ankaŭ vidi diversetajn filmojn kaj lumbildojn, plejparte pri okazintaj E-aranĝoj.

Ĉiuespere estis organizataj artaj programoj de apartaj respublikoj aŭ de apartaj regionoj de la lando. La plej abundajn aplaŭdojn gajnis E-ensemblo el Leningrado, E-koruso el Panevezys (Litovio),

grupo de internacia kanto „Inspiro“ el Ukrainio, gvidata de V. Soŝoka. Estis ankaŭ kvizoj kaj sportaj konkursoj, organizitaj de G. Gajdamaviĉius (Vilnius). Menciindaj estas la kvizo „Kion vi scias pri soveta Litovio?“ kaj la kvizo pri historio de Esperanto. La tendaranoj aktive partoprenis sportajn ludojn — konkuris ŝakistoj, korbopilkistoj, retpilkistoj.

Interese kaj utile pasis la renkontigo kun la gvidantoj de la Asocio de Sovietaj Esperantistoj kaj ties respublikaj filioj: P. Jegorovas, A. Skŭpas, J. Ojalo, V. Seguru, k. a.

Ĉiutage funkciis butikoj de E-aĵoj. Oni instruis kantojn, organizis ekspoziciojn, eldonis murgazeton.

Pri la tendaro la vastan publikon informadis la respublikaj radio kaj gazetaro.

Stasys GAJDAMAVIČIUS,
viceprezidanto de Vilnusia E-klubo

AMIKOJ LAŬ LA 45-A PARALELO

Okaze de la Jaro de Paco — 1986, la E-klubo „Saluton“ en Stavropol decidis organizi ekspozicion „45-a paralelo — ĉenero de la amikeco“. Oni ĉelas kontaktojn kun E-klubo kaj apartaj esperantistoj en urboj situantaj laŭ la 45-a paralelo.

La stavropolaj esperantistoj atendas viajn kontribuojn al la planata ekspozicio al adreso:

Sovetunio, 355029 — Stavropol, strato Socialistiĉeskaja n-ro 1, Biblioteko Majakovskij, E-klubo „Saluton“ — per Burlackaja L. Peljuŝenko T.



DEZIRAS KORESPONDI

BULGARIO

Mariana Dimitrova (19-jara) — u. Ĥarmanli, distrikto de Haskovo, bul. „G. Dimitrov“ 84, bl. 51, vh. 2, ap. 33 — pri ĉt, kun ĉl.

Hristo Tonev (kursgvidanto de Esperanto) — 9700 Sumen, „P. Volov“ 12 — pri ĉt kun ĉl.

GDR

50-jaraj geedzoj kun filino 16-jara — kun bulgara familio cele de reciproka gastigado. Fam. Schmitz, Block 484/12 Halle-Neustadt, DDR-4090.

HUNGARIO

László Szuromi (17-jara lernanto) — Eger, Rákóczi út. 54.8/26, 3300 H. — kun bulgara knabino pri muziko, PM kaj historio.

Pinczés György (24-jara) — Szigetszentmiklós, Gyári út. 7/c, H-2310 — pri senmotora flugado, muziko, vojaĝoj.

Borbála Szepesván (9-jara) — Szeged Vértói út 3. VI. (32 — kun bulgaraj geknaboj — PM, BK; kolektas portretojn de geamikoj kaj de gefilmaktoroj.

JAPANIO

36 geknaboj (10—12-jaraj) el elementa lernejo nomata Staigō-Syōgakkō fondis E-klubon „Internacia“. Ili dez. kor. kun bulgaraj geknaboj. La dezirantoj korespondi skribu al la adreso de ilia instruisto: S-ro Kazuya Isikawa ĉe Saigō-Syōgakkō, Kamisaigō 2606—2, Sizinoka-ken.

JUGOSLAVIO

Barbara Grgurevič — 51000 Rijeka, Dure Sragaro 32 — kun infanoj 11—8-aĝaj.

POLLANDO

150 personoj (plimulte pedagogoj, ĉefe 19—65-jaraj) dez. kor. por ekzerci la lingvon. Komuna adreso: Daniela Kazimierska, ul. Dubois 104/100, 87800 Włocławek, Pollando

RUMANIO

Marian Voshin — P. O. Box 30—93 71,400 Bukarest 30 — kun ĉl pri ĉt.

Szöke László (15-jara lernanto) — Tihadar 5, ap. 13, 4150 Odorheiu — Sec. jud. Harghita — pri elektrotekniko, fotado, naturo, k. a.

SOVETUNIO

Esperanto-familio havanta du knabojn-ĝemelojn — kun E-familioj en la tuta mondo: Vladimir kaj Ljudmila Girba, SU-279800 FLORESTI, p. k. 10, Moldava SSR.

44-jara esperantisto — pri kreado de Internacia Instituto de Homo por konservo de la civilizacio

Ĉefredaktoro: Dončo ĤITROV

Redaktoroj: Ĥaim LEVI (vicĉefredaktoro), Lidia RAEVA, Maria JANKOVA

Redakta komitato: Marin BACEV, Mariana ELENVA, Dimitar HAĜIEV, Krástju KARUCIN, Georgi MIĤALKOV, Venelin MITEV, prof. d-ro Kiril POPOV.

Teknika arango: Ljubomir LAZAROV
Korektisto: Jordan ĈALJOVSKI
Administranto: Asen JOSIFOV

ENHAŬO

P. ANGELOV. Malproksima Ĉinio kongresas . . .	II
Prof. HUMPHREY TONKIN. Interkompreniĝo, paco, evoluo . . .	1
NIKOLA PILEV. Digne plenumita tasko . . .	2
CANKO MURGIN. Historia optimismo de la bulgara Esperanto-movado (1936—1944) . . .	5
NEDKA VALJAVIČARSKA. Internaciaj someraj kursoj . . .	6
CVJATKO TODOROV. Amiko de junaj esperantistoj . . .	7
NIAJ VETERANOJ . . .	7—8
ATANAS ILKOV. Laŭ la nuntempaj postuloj . . .	9
NI RECENZAS . . .	1—12
YOSHIAKI MIZUNO. Raporto el Eŭropa Esperantujo . . .	1—13
DÓBRINKA ZAGOROVA. Kulturcentro aktivadas . . .	13
K.H. SIMON, I. ULRICH, B.D. MARINOV. Esperanto-termoj por la forstscienco . . .	14
ENLANDA MOVADO . . .	1—16
EL SOVETUNIO . . .	16
DEZIRAS KORESPONDI . . .	III
BRIGADANA SOMERO'86 . . .	IV

Sur la kovrilpaĝo: Komenciĝas la labortago por la partoprenantoj en la somera Internacia Junulara Brigado — Dolni Dábnik, distrikto de Plevén.

Foto: Georgi Ličev

„INTERNACIISTO“ — Esperanta revuo
Organo de KOMUNISTA ESPERANTISTA KOLEKTIVO (KEK)

Aperas 6-foje jare (ĉiun duan monaton)

Redaktejo en Leoben — Aŭstrio.

Peranto por Bulgario:

Ljuben GROZĐANOV, P. K. 25; Sofio 1309

Jarabono: 1,5 levoĵ

sur la Tero. M. 630090, Novosibirsko 90, Do vostrebovania, Korejŝa A. O.

Esperanta klubo en u. Norilsk — tutmonde pri ĉt. u. Norilsk, ul. Lenina-9, Esperanta klubo „Norda Stelo“.

Komencantaj esperantistoj 18—45-jaraĝaj serĉas samaĝajn leteramikojn el Bulgario — pri ĉiuj temoj. SU-626400 Tjumenskaja oblastj, SURGUT, DK „Enerĝetik“, Junulara E-klubo.

Gelernantoj de 5—8 klasoj dez. kor. kun bulgaraj infanoj pri ĉiuj temoj. SU-310002 ĤARKOV, ul. Sumskaĵa 37, Palaco de pioniroj KID „Romaŝka“.

15—50-jaraj diversprofesiaj esperantistoj serĉas leteramikojn tutmonde. Laimundas Abromas, SU-234432, pŝt. Pilis, Jurbarko raj. Litovio.

Gekomencantoj — 19-64-jaraĝaj, laŭ profesio muzikistoj, kuracistinoj, apotekistinoj, vartistinoj kaj geoficistoj; SU-Litovio 234270, Nilkaviŝkis, p. k. 4 Esperanto-klubo.

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordeno „Kiril kaj Metodij“ — I grado. Eldonkvanto 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:
„BULGARA ESPERANTISTO“
bul. „Ĥristo Botev“ 97

1303 Sofio, Bulgario

P.K. 66
1 000 Sofio

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“, bul. „Lenin“ 117

Brigadana somero '86



Memorfoto — la brigadanoj en vilaĝo Sadievo.

1946! Jaro memorinda por la bulgara brigadana movado! Jaro, kiam komenciĝis la libervola laboro de la junularo por fari nian patrolandon pli bela, pli riĉa, pli moderna! Jaro, kiam la juna generacio de Bulgario kun kantoj kaj ĝojo komencis konstrui la socialismon, fordonante tutkore siajn fortojn kaj libertempon.

40 jarojn brigadana movado signifas milojn da labortagoj kaj milojn da kilometroj da novaj ŝoseoj kaj fervojlinioj; novajn domojn, tunojn da legomoj kaj fruktojn rikoltitaj.

Dimitrovgrad — urbo portanta la nomon de Georgi Dimitrov; fervojlinioj, Hainboaz kaj Pernik-Volujak — nomoj, konataj al ĉiuj bulgaroj, ĉar ili estis konstruitaj de brigadanoj. . . Multaj bulgaraj esperantistoj partoprenis tiun sindonan laboron por nia patrolando!

Tiun ĉi tradicion daŭrigas ankaŭ la nuna bulgara esperantistaro. Multaj eksterlandanoj partoprenis en la organizitaj en nia lando internaciaj E-laborbrigadoj: Kaliakra kaj Debnevo estas nomoj konataj ne nur al la bulgaroj, sed al multaj junaj esperantistoj el diversaj landoj.

Ĉi-jare, de la 1-a ĝis 23-a de aŭgusto en urbo Dolni Dabnik, distrikto de Pleven, por kvara fojo estis organizita internacia laborbrigado. Ĉi-foje organizantoj estis ne nur BEJ kaj DE de BEA en Pleven, sed ankaŭ la Centra Komitato de la Komsomolo (Dimitrova Komunista Junulara Unuiĝo), kiu certigis la materialan bazon. Partoprenis 67 gejunuloj el Pollando (19), Jugoslavio (15), Ĉeĥoslovakio (9), Ekvadoro (1), Irako (1), Jemeno (1) kaj Bulgario (21). Sub la gvido de la brigadestro Bistra Dojĉinova kaj la membroj de la stabo Rumjana Kaŝarova, Ĥristo Filipov kaj Cvetan Filipov, la brigadanoj laboris en la legomkampoj de la loka agrikultura mastrumo. Dum la liberaj tagoj ili faris ekskursojn al Pleven, Loveĉ kaj al diversaj lokoj kaj vidindaĵoj. Ĉi-vespere okazis amuzprogramoj, diversaj renkontiĝoj, ludoj ktp. Plej interesaj estis la renkontiĝo kun la veterano de la brigadana movado Donĉo Ĥitrov, ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto“ kaj la renkontiĝo-dialogo inter gejunuloj-esperantistoj el Norda Bulgario, brigadanoj kaj la estraranoj de BEJ Cv. Miteva, M. Elenova kaj L. Trifonĉovski. Ĉe la fino de la dua renkontiĝo ĉirkaŭ la brulanta fajro okazis tre agrabla vespero dediĉita al la paco — kun kantoj, dancoj, deklamado de versaĵoj. La brigadanoj havis la plezuron viziti du koncertojn. La kulturprogramo estis varia, sed ne ĉiuj antaŭplanitaj

arangoj estis realigitaj pro nesufiĉa kono de Esperanto de plejparto el la brigadanoj. La estraro de BEJ akceptis nur aligilojn, konfirmitajn de la naciaj esperantistaj junularaj sekcioj aŭ de lokaj kluboj. Tio do signifas, ke la aliginto estas esperantisto posedanta almenaŭ bazajn lingvokonojn. Sed kia estis nia surprizo, kiam anstataŭ la aligintaj esperantistoj alvenis iliaj anstataŭantoj, tute ne sciantaj Esperanton! Nur 15 personoj el la sin antaŭanoncintaj eksterlandanoj aivenis. Kaj nur 6—7 el ili parolis la Internacian Lingvon. La ceteraj simple. . . krokodilis!

La situacio en la alia Internacia Junulara Laborbrigado, organizita en la sama periodo (1—23.08.86) en v. Sădievo, distrikto de Burgas, estis tute alia. Ĝin partoprenis 43 junaj esperantistoj el Pollando (11), Jugoslavio (10), Hungario (7), GDR (1) kaj Bulgario (14). La etoso estis agrabla kaj la rikolto de pomoj kaj persikoj estis rezultodona: oni plenumadis la labornormojn je 100-150%!

Brigadestro estis Elena Stojkova kaj membroj de la stabo estis Ivan Gaņev kaj Minka Stojanova (ŝi laboris ĉiutage kune kun la brigadanoj). Oni elektis ankaŭ respondeculojn de la apartaj naciaj brigadtaĉmentoj, kiuj helpadis la solvodon de diversaj problemoj. Dum la libera tempo la brigadanoj vizitadis plaĝon, la distriktan centron Burgas, sunbrunigadis kaj partoprenis la kultur-programerojn. La plej interesaj estis: kvizo „100 jarojn Esperanto“ okazinta inter teamoj de la laborbrigado kaj E-societo „Orel“ (Aglo) en urbo Aĵtos, vespero de la amikeco, renkontiĝo kun Enjo Enev — partopreninto en la 71-a UK en Pekino, ŝakturniro, vespero dediĉita al la vivo de gejunuloj en Pollando kun projekciado de diapozitivaj.

Menciinda estas la unutaga komuna laboro de la brigadanoj kun gejunuloj el v. Sădievo kaj esperantistoj el Aĵtos kaj Burgas.

Dum la liberaj tagoj oni vizitis la pitoreskan urbon Sozopol, insulon Bolŝevik kaj aliajn vidindaĵojn en la distrikto.

Ĝojigis min la vortoj de la brigadanoj, kun kiuj mi sukcesis paroli dum la lasta vespero post la distingo de la premiitoj kaj la oficiala fermo.

Evá Andó (Hungario): „Mi estas tre kontenta, tiel kontenta, ke mi bedaŭras, ke jam devas forveturi el Bulgario“.

Lidka Dzinrzyńska (Pollando): „Tio estas mia unua laborbrigado. La laboro ne estis tre laciga kaj mi sentis min agrable kaj libere.“

Stepan Lavroviĉ (Jugoslavio): „Mi estas tre kontenta. En la komenco mi havis iujn hezitojn, sed poste ĉio tre plaĉis al mi.“

Agrable estis aŭdi tiujn vortojn, kiuj estas vera rekono pri la granda laboro de la organizantoj. Sincerajn gratulojn al DE de BEA en Burgas, kiu estis la iniciatinto kaj ĉeforganizanto de tiu unua komuna arango kun BEJ!

Ni dankas al ĉiuj oficialaj organizaĵoj, kiuj helpis la organizadon de ambaŭ laborbrigadoj, al la brigadestroj kaj al ĉiuj brigadanoj, kiuj sincere fordonis sian liberan tempon kaj konscie laboris dum tiu jubilea brigadana somero.

Ni kredas, ke tiuj du Internaciaj Esperantistaj Junularaj Laborbrigadoj multe kontribuis al la amikigo de gejunuloj el diversaj landoj.

Mariana ELENOVA,
vicepresidentino de BEJ,
estraranino pri internaciaj rilatoj

